


EL POPOLA CINIO

人民中國報道

4 · 1964





Ole-rafina Ekipaço en Muntado

Foto de Gâng Ping



NIA VOJO POR INDUSTRIIGO

Ŝtaluzino ĉe Anŝan.

Foto de Sun Pejjong

MUJI

BALDAŭ estos la dekkvina datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio. En la pasintaj dek kvin jaroj, Ĉinio jam unuapase establis sian sendependan kaj firman fundamenton de industrio. La produktopovo de la moderna industrio nove disvolvita jam superis tiun akumulitan dum la pasintaj cent jaroj antaŭ la Liberiĝo. La produktado de nemalmultaj branĉoj de peza industrio, kiaj tiuj de ŝtalo kaj fero, ĥemio, ŝtonoleo kreskis dekelkoble aŭ kelkdekoble. Multaj industriaj branĉoj, kiaj tiuj de traktoro, aŭtomobilo, pezaj maŝinoj, precizaj instrumentoj, k.t.p., kiuj ne ekzistis en la pasinteco, jam ekestabliĝis. Produktaĵoj de la nova Ĉinio, inkluzive tiujn de peza kaj malpeza industrioj, jam ĝuas internacian bonfamon.

DE KIE VENAS LA KAPITALO?

La malnova Ĉinio profunde suferis ekspluatadon de koloniismo kaj pro tio estis tre mizera. La liberiĝinta ĉina popolo nature neniam volas akumuli kapitalon por industria konstruado per milita aŭ ekonomia rabado al aliaj landoj. Ni do prenas disvolvon de produktado kaj severan praktikadon de ekonomio kiel la ĉefajn rimedojn por akumulo de kapitalo.

Antaŭ ĉio, la ŝtataj entreprenoj de tutpopola posedo akumulis grandan kvanton da kapitalo por nia industria konstruado. La laboristoj de la ŝtataj entreprenoj donas rekte al la ŝtato parton de la riĉaĵo kreita de ili mem, en la formoj de profito kaj im-

posto de la entreprenoj kaj tiel multigas la kapitalakumuladon de la ŝtato. Tiu parto okupas pli ol 80% de la tuta financa enkasigo de la ŝtato. Ankaŭ la terkulturistoj donas malgrandan parton de la tutjara gajno al la ŝtato en la formo de imposto por kapitalakumulado, krom la elspezoj por pligrandigi la produktadon de la kolektiva ekonomio kaj tuj plibonigi sian vivon, sed tiu ĉi parto de akumulado okupas nur ĉir. 10% de la tuta financa enkasigo de la ŝtato.

En la pasintaj dek kvin jaroj, surbaze de la senĉesa disvolvo de la produktado kaj paŝopostpaŝa plibonigo de la popola vivo, la enspezo de Ĉinio havis okulfrapan kreskon. La enspezo de la ŝtato en 1950 estis nur 6,520,000,000 juanoj kaj pligrandiĝis ĝis 31,020,000,000 juanoj en 1957. Dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano de 1953 ĝis 1962 la totala enspezo de la ŝtato grandegre kreskis kompare kun tiu dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano. Sekve de la kresko de la enkasigo, ankaŭ la investo de la ŝtato por konstruado senĉese pligrandiĝis. La industria fiksa posedaĵo de la malnova Ĉinio akumulita dum la lastaj cent jaroj estis nur 12,800,000,000 juanoj, sed en la nova Ĉinio la fiksa posedaĵo de industrio konstruita dum la dek kvin jaroj estas jam kelkoble pligranda ol la supredirita cifero.

LA INDUSTRIA FUNDAMENTO ESTAS JAM METITA

Rilate al maŝinoj, ekipaĵoj, precipe ekipaĵoj por peza industrio kiel fundamento de industria kon-

struado, ni povas diri ke la malnova Ĉinio postlasis al ni preskaŭ nenan heredajon. Sed itu malfacilaĵo ne malhelpis kaj neniel povis obstrukci la sukcesan antaŭeniron de nia konstruado, male, ĝi eĉ instigis la ĉinan popolon strebadi al prospero kaj potenciĝo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, tuj post la mallonga periodo trijara por restarigo de la nacia ekonomio, komencis la grandskala konstruado. Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) ni unuflanke importis el frataj socialismaj landoj sufiĉe grandan kvanton da modernaj ekipaĵoj kaj establis nian propran novan pezindustriion; aliflanke ni pozitive utiligis kaj reformis la malnovajn entreprenojn, plialtigis la nivelon de la originala industria tekniko, plialtigis la kvaliton kaj plimultigis la specojn de produktaĵoj, fabrikis modernajn maŝinojn kaj ekipaĵojn. Je la fino de la periodo de la Unua Kvinjara Plano la unuapaŝa fundamento de socialisma industrio estis jam metita. Dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962), sub la gvidado de la ĝenerala linio "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie", proponita de la Ĉina Komunista Partio, la socialisma industriigo de Ĉinio faris unu grandan paŝon antaŭen, kaj la pezindustrio kun pli forta fundamento kaj pli kompleta branĉaro estis jam establita.


Antaŭ la Liberiĝo, Ĉinio povis produkti generatoron nur kun kapacito de ne pli ol 200 kilovatoj, sed nun Ĉinio jam povas fabrikati kompletan ekipaĵon de hidroelektra maŝinaro de 72,500 kilovatoj. En la granda hidroelektra centralo ĉe Hin-an-rivero nun konstruata, la jam instalitaj tri generatoroj kun kapacito de po 72,500 k.v., estis fabrikitaj de Ĉinio mem. Same kiel la industrio de generatoraj ekipaĵoj, ankaŭ la novaj produktaĵoj de la aliaj industriaj fakoj multiĝas jaron post jaro. Nun ni jam havas la kapablon fabrikati ankaŭ grandtipajn kaj modernajn ekipa-


ĵojn por metalurgio, minekspluatado, elektro-produktado, rafinado de ŝtonoleo, fabrikado de hemisterko, k.t.p. La Vuging-a Ĥemia Fabriko en Ŝanhajo, finkonstruita en 1963, estas la unua grandtipa nitro-sterka fabriko projektita kaj konstruita de Ĉinio mem. La unuaperioda konstruado de tiu ĉi fabriko jam pretigis por ĝi la laborejon de sinteza amoniakajo kun jara produktokvanto de 25,000 tunoj, tiun de sulfuracido kun jara produktokvanto de 80,000 tunoj, kaj tiun de amonia sulfato kun jara produktokvanto de 100,000 tunoj, kaj iliaj ekipaĵoj estas senescepte enlande fabrikitaj.

Samtempe kun la establo de la novaj industriaj fakoj kaj senĉesa plialtigo de la nivelo de la industriaj teknikoj, multe grandiĝis ankaŭ la proporcio de diversaj materialoj kaj ekipaĵoj memprovizataj de Ĉinio en la ekonomia konstruado. La proporcio de memprovizita ŝtala materialo, kiu estis ĉ. 75% dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano, altiĝis ĝis ĉ. 90% dum tiu de la Dua Kvinjara Plano. Kaj la proporcio de memprovizitaj maŝinoj kaj aliaj ekipaĵoj altiĝis de ĉ. 55% dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano ĝis ĉ. 85% dum tiu de la Dua Kvinjara Plano. La specoj de ŝtalo, ŝtala materialo kaj koloraj metaloj produktitaj en Ĉinio en 1962 multiĝis pli ol unuoble kompare kun tiuj en 1957. La specoj de ŝtonoleo preskaŭ triobligis kaj tiuj de ilmaŝinoj plimultiĝis je 1½ obloj. La amasaj movadoj sur la industria fronto dum 1963 alportis novan disvolviĝon en kvalito kaj specoj de industriaj produktaĵoj de Ĉinio, kaj samtempe pluapaŝe malaltigis la produkto-koston. Antaŭe, la plejparto de la enlande konsumita petrolo estis importita, sed nun ni jam povas fundamente plenumi nian bezonon de ŝtonoleo per nia propra produktaĵo. Ĉinio jam kapablas mem fabrikati preskaŭ ĉiajn ekipaĵojn bezonatajn por grandskala industria konstruado.

Bormaŝinoj sur la Daking-a Olekampo.

Foto de Juan Ling





Ŝtonoleo-rafinejo ĉe Lanĝou.

Foto de Li Feng

KULTURADO DE TEKNIKISTOJ

La sciencaj kaj teknikaj fortoj postlasitaj de la malnova Ĉinio same estis tre malgrandaj, kiuj kaj en kvanto kaj en teknika nivelo estis tro mizeraj por respondi al la postulo de la socialisma industriigo. Kiamaniere ni solvu tiun problemon? Ni apogas nin sur kulturado per ni mem.

De post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Registaro zorge atentis la disvolvigon de klerigado, scienca esplorado kaj kulturado de sciencaj teknikistoj, kaj jam akiris grandan sukceson. Dum la periodo de 1949 ĝis 1962 la diplomitoj nur el la altaj lernejoj jam atingis pli ol naŭcent milojn, kiuj estas pli ol kvaroble plimulte ol tiuj dum la dudek jaroj antaŭ la Liberiĝo, kaj el kiuj tricent sepdek mil estas inĝenieraj teknikistoj, kiuj estas dekunuoble pli multe ol la teknikistoj kulturitaj dum la regado de Kuomintango (1929-1949). Antaŭ la Liberiĝo, la rekorda nombro de diplomitoj el la altaj lernejoj en unu jaro estis nur dudek kvin mil, sed nun ili nombriĝas cent kelkdek miloj.

Krom la kulturado de sciencaj kaj teknikaj laborantoj tra la lerneja edukado, ni ankaŭ vaste adoptas la metodojn de kulturado de teknikaj funkciuloj kaj spertaj laboristoj per mallongaj kursoj, per disvolvo de postlabora lernado kaj instruado de majstroj al metilernantoj en industriaj entreprenoj. Ankaŭ kulturado kaj promocio de teknike spertaj veteranaj laboristoj al gvidaj postenoj de tekniko estas unu el niaj gravaj aranĝoj por grandigi la trupon de sciencoj kaj teknikoj.

MEMPROJEKTADO

Dank' al la rapida disvolviĝo de la teknikaj fortoj, Ĉinio jam trapasis la stadion de fruktouzo kaj imitado de fremdlandaj projektoj, kaj eniris la stadion de sendependa projektado en produkto de multaj el la gravaj industriaj produktaĵoj. La nombro de la komplete aŭ parte finkonstruitaj grandaj kaj mezgrandaj industriaj entreprenoj projektitaj kaj ekipitaj de Ĉinio mem dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano estis 413, kaj tiu de la periodo de la Dua


Kvinjara Plano estis 1013. Nun ni jam povas mem projekti kaj konstrui multajn grandtipajn industriajn unuojn, kiel modernan karbominejon kun jarproduktado de miliono da tunoj da karbo, ŝtalan kombinumon kun jarprodukto de unu kaj duona milionoj da tunoj da ŝtalo, petrolrafinejon povantan prilabori pli ol milionon da tunoj da nafto, fabrikan de nitro-sterko kun jara produktopovo de 100,000 tunoj, fabrikan de grandtipaj maŝinoj, hidroelektrajn kun kapacito de pli ol 650,000 kilovatoj k.t.p.

MEMHELPO KAJ HELPO DE ALIAJ

La ĉina industria konstruado, same kiel la ĉina revolucio, estas efektiva ĉefe de la ĉina popolo. La subteno de la popoloj kaj la internaciismaj helpoj de la proletaro de ĉiuj landoj ludis, kompreneble, tre signifan rolon en ĉiu historia stadio. Sed ĉina proverbo diras: "Homo devas memstari." Alie li falos aŭ ĉi tiun aŭ alian flankon eĉ kun helpo de iu alia. En la ĉina revolucio Sun Jat-sen iam revis sin apogi sur helpoj de okcidentaj burĝaroj sed trafis malsukceson. La usonaj imperiistoj trumpetadis pri helpo al Ĉiang Kajŝek por konstruado, sed rezulte de tio la ĉina popolo estis pli firme alligita al la militĉaroj de la usona imperiismo.



Sekve, ankaŭ en la konstruado ni klopodas unue kaj ĉefe plene utiligi niajn proprajn homfortojn, materialon, monrimedojn kaj ĉiajn enlandajn pozitivajn faktorojn. Tamen, samtempe ni ankaŭ klopodas gajni kaj jam akiris subtenon de niaj frataj landoj kaj la tutmonda popolo. Ni ĉiam penadas plifortigi la interhelpon, kunlaboron kaj reciprokajn subtenon kun socialismaj landoj, kaj energie lerni la konstruan sperton de niaj frataj landoj. Samtempe, sur la fundamento de egaleco kaj reciproka profitigo ni ankaŭ disvolvas komercadon kun landoj de malsamaj socisistemoj kaj lernas ĉiajn progresintajn teknikojn en la mondo.






Rezulte de la persista batalado de la ĉina popolo, la ĉina revolucio jam atingis grandan sukceson. Nun, ankaŭ en nia konstruado tiu ĉi spirito komencis elkreskigi novajn florojn.



- 1) La precizaj ilmaŝinoj ekspozitaj en la Ĉina Foiro de Eksportataj Komercaĵoj. Foto de Ĉaj Zongĝi
- 2) Sintezamoniaka produktejo de la nova azotosterka fabriko. Foto de Ĝu Han
- 3) Preciza dentrado-frezmaŝino, instalaĵo por produktado de agrokulturiloj. Foto de Ĝang Ping

- 4) Maso-spektrometro, projektita kaj farita en Ĉinio. Foto de Li Gilu
- 5) Dentrado-frotummaŝino. Foto de Huang Hiangkun
- 6) Nova altpreciza optika koordinata bormaŝino. Foto de Vang Ĉuanguo





LA NASKIĜO DE UNU GRANDA

LA Vuging-a Kemia Fabriko impone staras ĉe la bordo de Huangpu-rivero en Ŝanhajo. Ĝi estas la unua el tiuj grandtipaj fabrikoj de nitrogensterko kiujn ni mem projektis, konstruis, ekipis per niaj propraj maŝinoj kaj ni mem instalis kaj funkciigas.

Kun ekscitiĝo ni trarigardis la laborejojn de tiu moderna fabriko. Kvankam nevideblaj estas la diversaj tubolinioj kaj la okazantaj mirindaj ŝanĝiĝoj en la maŝinoj, tamen ni vidis kiel la laboristoj kun plena atento manipulas la kontrolajn aparatojn starante antaŭ ili. Dum la vizitado ni informiĝis ankaŭ pri la naskiĝo de ĉi fabriko pri kiu ili rakontis kun fiero.

La laboristoj kaj teknikistoj kiuj partoprenis en ĝia konstruado venis el diversaj lokoj, tute sen scio pri produktado de kemia sterko. Sed malfaciloj ilin ne dispremis. La rapidega finkonstruo de la altprema lavejo de la fabriko tion pruvis klare. Ĝi estas la ĉefa laborejo por produktado de kemia sterko kaj ĝi havas 15 trusojn, el kiuj ĉiu pezas 30 tunojn, kaj du kunpremilojn, por kies instalado oni devis pretigi du betonajn konstruaĵojn pezantajn po 3000 tunojn. Estis necese levi kaj instalati por ĝi 20-tunan moveblan pontokranon. . . giganta estis la laboro, strikta la postulo, kaj krome oni devis fari ĉion ĉi dum vintro, kio estigis malfacilojn kaŭze de la frosto. La konstruistoj kaj laboristoj de la fabriko laboregis ŝultron ĉe ŝultron. La ĉefdirektanto kaj ĉefinĝeniero persone tie laboris. La vicĉefinĝeniero kaj aliaj inĝenieroj kaj teknikistoj de la Projekta Sekcio kun desegnapaperoj en la manoj klarigis al laboristoj kiel fari la laboron. Ili ankaŭ partoprenis en transportado de cemento kaj alnajlado de signotabuletoj. Tiu malfacila konstrua laboro plenumiĝis en nur dek tagoj.

Ĉe ĉiu paŝo de la konstruado estas diversaj malfaciloj grandaj kaj malgrandaj. Kiel la altprema lavejo tiel ankaŭ aliaj konstruaĵoj tre rapide stariĝis en la kamparo ĉe borde de Huangpu-rivero.

Jen! leviĝis la sinteza konvertujego, la koro de kemisterka produktado, konstruita de la Ŝanhaja

Kaldronego-fabriko. Kiu fabrikis la altpremajn maŝinojn? Gingje-maŝinfabriko.

La sinkrona motoro multpolusa kun malalta rapideco kaj 2500 ĉevalpovoj, 35 tunojn peza estas produktita de la Ŝanhaja Fabriko de Elektromaŝinoj.

Tie, la diversaj tuboj, se kunigitaj, longas 45 km. La plej dika tubo havas diametron de 1.8 m. kaj la plej maldika nur 6 mm. La plej peza instalaĵo atingas 350 tunojn. Diversaj kontrolaj mezuriloj kaj aparatoj per kiuj oni direktas la produktadon de la tuta fabriko nombriĝas je pli ol mil. La multnombraj precizaj maŝinoj kaj aparatoj ĉiuj portas la etiketon "Farita en Ĉinio". Pli ol cent fabrikoj faris ekipaĵojn por tiu ĉi fabriko.

La altpremaj ujoj instalitaj en la ĉefa laborejo estas tiel gravaj ekipaĵoj, ke sen ili ne eblas produkti amoniakon kaj sekve kemisterkon. La ok altpremaj kaj mezpremaj ujoj estis sukcese provfartitaj en du jaroj de la laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Kaldronego-fabriko. En la pasinteco, tiu fabriko povis nur produkti malaltpreman kaldronegon kiu povas elporti nur 13-oblan atmosferpremon. Sed la altprema ujo por kemisterka produktado ne nur devas rezisti varmegon kaj korodon, sed ankaŭ elporti 320-oblan atmosferpremon. La sukceso fari ĝin tia estas ja saltego en tekniko. La muro de la altprema sinteza konvertujego konsistas el 19 tavoloj da 6 mm. dikaj ŝtalplatoj. Ĝia internaĵo estas tre kompleksa. La laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Kaldronego-fabriko ne malkuraĝiĝis antaŭ la malfacila tasko de kreado de tia altnivela produktaĵo. "Ĉio estu kreita per niaj propraj manoj!" Ili renkontis pli ol cent teknikajn problemojn sed bone ilin solvis kaj fine sukcese ĝin produktis dank' al sia firma volo kaj energia strebado en intima kunlaborado kun la gvidantaj funkciuloj.


Hodiaŭ kiam ni staras en laborejo de la Vuging-a Kemia Fabriko, rigardante al la kemisterko kiu ruliĝas malsupren kaj aŭdante la zumadon de la maŝinoj, nia sango boliĝas pro la imago pri la heroa laborego de la konstruistoj, muntistoj, elektristoj kaj transportistoj, sur tiu ĉi tereno por finkonstrui la fabrikon.

FABRIKO

Nova fabriko, novaj ekipaĵoj kaj novaj homoj. Vi povas vidi, kie ajn vi iras en la laborejoj, knabinojn kun mallongaj haroj aŭ harplektaĵoj kaj junulojn fortikajn lerte kaj atenteme manipulantajn la maŝinojn fiksrigardante la nadlojn en la aparatoj.

Kiam oni komencis konstrui la fabrikon, nur tri personoj, inkluzive de la fabrikestro, iam partoprenis en produktado de kemisterko. Sed la vojo estiĝas per irado de homoj. Kiam Tang Ŝangde, la nuna deĵoranta ĉefo de la sinteza laborejo, alvenis al la fabriko post diplomiĝo el la Pekina Kemiindustria Lernejo, la gvidantaro de la fabriko donis al li kompletan desegno-paperojn pri la konstruo de la sinteza laborejo. Li kalkulis ilin: pli ol dekmil folioj. Li ilin rigardis kaj rigardadis tage kaj nokte, kaj li sukcesis havi ĝeneralan bildon pri la laborejo, nur post unu monato. La junulo kun rubanda mezurilo en la mano kuris tien kaj reen sur la konstrua tereno de la estonta fabriko. Li persone partoprenis la konstruadon kaj instaladon, kaj kun forta emociiĝo li akceptis la elprovon de la unuafoja ekfunkciigo de la maŝinoj. Fine konstruiĝis la laborejo kaj ekfunkciis por produktado. La junulo ankaŭ rapide mastris la procedaron de kemisterka produktado kaj fariĝis teknika direktanto de la fabriko. Multaj teknikaj laborantoj estas ĉi tie bakitaj per praktikado dum la konstruado kaj produktado de la fabriko.

Ankaŭ sur la vojo de lernado de la nova produkta tekniko estis malfaciloj, precipe por tiuj kiuj transposteniĝis de aliaj okupoj kaj volis fariĝi lerta laboristo de kemiindustrio. Kiam laboristo Ĝu Ginseng, nun sperta direktanto de la gasgeneratoro transvenis de iu presejo sur la kemiindustrian postenon, li murmuris al si mem antaŭ la dikventra gasgeneratoro: "Kio estas en ĝi? Kial eniras nigra koakso sed eliras neĝblanka kemisterko?" Poste li aliĝis al la teknika kurso organizita de la fabriko.




Produktejo de sinteza amoniako de la Vuging-a Kemia Fabriko de Ŝanhajo.

Foto de Jang Putaŭ

Ĉiujn signojn kaj ekvaciojn de kemio li notis en sian kajereton, aŭ sur slipojn kiujn li algluis sur la muro ĉelita. Kaj li klopodis ilin parkere memori kie ajn li iris kaj bone ellernis la unuan libron pri produktado de sinteza amoniako.

Kun tia persisteco lernadas la laborantoj de la Vuging-a Kemia Fabriko. Ĉiuj, ĉu gvidantoj aŭ simplaj laboristoj, faras la samon.

Kiam la konstruo de la fabriko komenciĝis, membroj de la najbara komunumo alkuris amase por demandi: "Kiam via fabriko povos liveri al ni kemisterkon?" La laboristoj de la fabriko bone konscias la pezan respondecon sur siaj ŝultroj precipe post la elmetiĝo de la alvoko por granda konstruado agrikultura. Kaj nun ili estas energie laborantaj kun plena memfido por produkto de pli multe da kemia sterko.



Intensa trafiko sur la "dolĉa rivero" ekster la Ĝongŝan-a Suker-rafinejo

DE kiam Guangdong-provinco estis liberigita en la vintro de 1949, forpasis jam preskaŭ dek kvin jaroj. Rerigardante mian faritan laboron, mi sentas tre grandan ĝojon.

OKUPATECO KUN ĜOJO

Kiam mi komencis labori kiel gvidanto en industrio, mi ne havis plenan memfidon, ĉar antaŭ la Liberiĝo mi laboris dum longa tempo en malnova armeo, ja laiko mi estis en industrio. Sed mi trovis sur la nova posteno, ke multaj kolegoj — kompartianoj kaj ne-kompartianoj — ĉiuj estas tiel modestaj, ke, kiam ajn ili trovas ion nekonatan, tion ili tuj ek-lernas; kiam ajn ili eksentas mankon de sperto, ili tuj ekfaras esploradon en praktiko. Laŭ iliaj ekzemploj ankaŭ mi ofte iris en fabrikojn kaj kamparojn por inspekti laborojn kaj lerni praktikajn spertojn de la popolamasoj, kaj utiligi ilin poste en direktado de laboro. Lernante dum laborado kaj laborante dum lernado mi akiris iom post iom pli bonankonon pri mia laboro kaj finfine ĝin prenis sur min serioze.

Sekve do mia laboro min ĉiam pli intense okupas. Sed ja ĉiuj estas tre okupataj, ĉar ni energie laboras por kiel eble plej rapide ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de nia lando. Ĝuste dank' al la diligenta laboro de la tuta popolo sub la gvido de la popola registaro la konstruado de nia lando povas tiel rapide disvolviĝi. Ni prenu la malpezan industrion de Guangdong-provinco kiel ekzemplon. Antaŭ la Liberiĝo en Guangdong-provinco troviĝis neniu konsiderinde bone ekipita fabriko malpezindustria kaj tre multajn specojn de varoj la provinco ne povis produkti. Tiam en la komercejoj svarmis varoj importitaj el eksterlando. Ekzemple, ne nur vekhorloĝo, biciklo k.a. sed eĉ ankaŭ fermentpulvoro estis importitaj el Usono. Sed hodiaŭ la industria branĉoj de plastajo, horloĝo, biciklo, suker-rafinado, kemiaĵoj,

vitro kaj papero estas nove starigitaj unu post alia, per kio tre larĝan disvolviĝon faris la malpeza industrio de tiu provinco. En 1962 ĝia totala produktovalor (ekskluzive tiun de ŝpinteksa produkto) kreskis je 8 obloj kompare kun tiu en 1949 kaj la specoj de la produktaj nombriĝis pli ol 8000. En 1963 la stato estis eĉ pli bona, ke la jara produktovalor kreskis je 8% kompare kun tiu en 1962, kaj la kvalito de la produktaj firmaĵe altiĝis. Nun la loĝantoj en Guangdong-provinco jam povas havigi al si diversajn ĉiutagajn bezonaĵojn fabrikatajn en sia provinco. Kaj cetere, pli ol 200 specoj de produktaj, inkluzive enladigitajn manĝojn, fajnencon,

porcelanon, fortepianon, gazet-paperon, estas eksportataj en iujn landojn de Azio, Afriko kaj Eŭropo, kaj ilia kvanto pligrandiĝas jaron post jaro. En 1963 la valoro de la eksportitaj malpezindustria produktoj de la provinco kreskis je pli ol 8 obloj kompare kun tiu en 1956. Ekscitiĝon kaj fieron mi sentas pro la prospero de nia patrio. Ke mi persone faris kontribuon al nia patrio, tio ja min des pli ĝojigas. Tial, ĉiufoje, kiam iuj el miaj malnovaj amikoj min demandis pri mia laboro, mi ĉiam respondis: Tre okupata mi estas, tamen kun ĝojo.


KION ONI VOLAS, TION ONI POVAS

Ĉar nia origina industria bazo estis ne-solida, tial nia konstruado iras ne sen malfacilaĵoj. Sed dank' al tio, ke ni ĉiuj diligente laboras strebante forte antaŭen kaj sin apogante al niaj propraj rimedoj, la malfacilaĵoj ĉiuj estas venkitaj de ni unu post alia.

En la lastaj jaroj ni fondis, unu post alia, kolegiojn de malpeza industrio, esplorajn projektajn institutojn, maŝin-instalajn kompaniojn, kaj plipotencigis maŝinfabrikojn. Dank' al tio, ni ne nur povas venki malfacilaĵojn, sed ankaŭ posedas pli grandajn fortojn,

MIA ĜOJO

ĈEN JUPING*



Unu el la laborejoj de la Nanhaj-a Suker-rafinejo en Guangdong-provinco.

al kiuj ni povas nin apogi en la socialisma konstruado. Ekzemple, la ekipaĵoj de Ĝongŝan, Nanhaj kaj aliaj grandaj suker-rafinaĵaj fabrikoj kun kapablo premi 2000 tunojn da sukerkanoj tage estas projektitaj, fabrikitaj kaj instalitaj ekskluzive de niaj teknikistoj kaj laboristoj. La ferment-pulvoro kun fabrika marko "Perlo-rivero", produktata de la ferment-pulvora fabriko "Njuli" en Kantono jam atingis la nivelon internacian en kvalito. Kaj la elfabrikado de pli ol dudek specoj de produktajoj vaste ŝatataj tra la tuta lando kaj eksterlande, inkluzive enladigitan ananason, gazet-paperon, kudromaŝinon, estas atingajoj de ripetitaj provoj kaj esploroj kaj la senĉesa plibonigo de kvalito faritaj de la teknikistoj kaj laboristoj de la respektivaj fabrikoj sub la helpo de esploraj institucioj. Vera estas la proverbo: "Kion oni volas, tion oni povas." Mia pli ol dek-jara laboro tion pruvis elokvente.

ŜANĜOJ EN MIA NASKIĜLOKO

En la pasinteco mia naskiĝloko Hingning-gubernio apenaŭ havis unu bonan rikolton en jardeko. En la monta regiono, se ne pluvis dum pluraj sinsekvaj tagoj, tuj estiĝis trosekeco; en la ebenejo, se ekpluvegis, tuj estiĝis inundo. Sed nun proksime de Heŝuj-rivero konstruiĝis akvorezervejo, kiu povas esti utiligata por batali kontraŭ inundo, irigacii kaj fiŝbreddi, kaj plie ĝi kaj aliaj irigaciaj konstruoj en la tuta gubernio kune formis akvoutiligan reton, kiu fundamente forigis minacojn de trosekeco kaj superakvo de la tuta gubernio. Tial, kvankam en 1963 Hingning-gubernio trafis la plej seriozan trosekecon en la lastaj sesdek jaroj, ke en la daŭro de ses-sep monatoj ne falis pluvo sufiĉa por tramalsekigi la supran tertavolon, tamen la grena produktokvanto ankoraŭ iom pliiĝis.

Dum mia lastatempa vizito al mia hejmvilaĝo, la ŝanĝiĝo de ĝia fizionomio min impresis tre profunde. Post kiam la akvon de la akvorezervejo oni ekutiligis por elektroproduktado, proksime de la akvorezervejo stariĝis multampla nutraj-prilaborejo kaj en iuj vilaĝanaj domoj instaligiĝis eĉ elektraj lampoj. Ke en tiu ĉi de ĉiam nomata malriĉa kaj izolita montvilaĝo oni ekhavis elektrajn lampojn kaj fabrikon, tio ja devas esti kalkulata kiel granda ŝanĝiĝo. Pli boniĝis iom post iom ankaŭ la trafikaj kondiĉoj en la monta regiono. Antaŭ la Liberiĝo en mia naskiĝloko, nun Pingjang-komunumo, ne ekzistis ŝoseo, tial, ĉiufoje, kiam mi volis eniri la urbon, mi devis piedpaŝi pli ol dek liojn antaŭ ol mi povis utiligi aŭtobuson. Sed nun ŝoseo jam sin etendis ĝis la pordo de mia domo.


MIA FAMILIO

Parolante pri mia naskiĝloko, mi ekpensas pri mia familio pretervole. Mia maljuna patrino, kvankam jam preskaŭ naŭdekjara, tamen ankoraŭ ĝuas tre fortan sanon. Miaj fratinoj ĉiuj aniĝis al la popola komunumo, kaj la edzo de mia malpliĝa fratino estas eĉ kadro de produkta brigado. Ankaŭ mia edzino nun havas labor-postenon. Miaj pliĝaj filo kaj filino ambaŭ nun laboras en Kantono post diplomiĝo el universitato. La dua filo lernas elektran teknikon en suker-rafinejo proksima al Kantono kaj la du plej junaj infanoj lernas en malsupera mezlernejo. En ĉiu ferio kaj festotago la familianoj ĝoje kuniĝas en la hejmo kaj en somero mia tuta familia rondo fojfoje kune eliras por naĝado. Por mi, maljunulo pli ol kvindekjara, tia vivo ja estas tre feliĉa.

** La aŭtoro estas vicestro de la Malpezindustria Departemento de Guangdong-provinco.*

Enladigitaj liĉioj produktitaj de la Guangdong-a Fabriko de Ladmanĝoj estas en pakado.





“FREMDLANDA OLEO” — NOMO ARKAIKIĜINTA

ARKAIKIĜIS en la ĉinlingva vortaro unu plia nomo t. e. “fremdlanda oleo”, per kiu la ĉina popolo nomis petrolon por multaj jaroj. Ekde la lasta jaro, la ŝtonoleaj produktaĵoj de Ĉinio jam fundamente sufiĉas por la enlanda bezono.

La natura provizo de ŝtonoleo en Ĉinio estas tre riĉa. Antaŭ pli ol mil okcent jaroj niaj praaĵoj jam faris notojn pri tiu natura riĉaĵo kaj ĝia utiligo. Sed, pro la longtempa regado de feŭdismo, kaj precipe la imperiisma invado dum la lastaj cent jaroj kaj la reakcia regado de Kuomintang-o, neniam efektiviĝis geologia esplorado pri niaj riĉfontoj de ŝtonoleo. La imperiistoj ja diris, ke “Ĉinio estas lando al kiu mankas ŝtonoleo”, intencante longtempe subpremi la disvolviĝon de ĉina petrolo industrio. Antaŭ la Liberiĝo, ĉiaj ŝtonoleaj produktaĵoj bezonataj ĉe ni devis esti importataj, kaj pro tio la popolo nomis ŝtonoleon “fremdlanda oleo”.

La “fremdlanda oleo” estis unu el la varoj plej frue dumpingitaj en Ĉinio fare de la imperiistoj post la Opia Milito en 1840. De post la sepdekaj jaroj de la deknaŭa jarcento, la usona *Standard Oil Company* komencis eksporti “fremdlandan oleon” al Ĉinio. Dum la periodo de la Kuomintang-a regado, la kvanto de importita petrolo kreskis ĉiujare, kaj foje eĉ okupis la trian lokon inter la importaĵoj.

Antaŭ la Liberiĝo, estis necese importi tiel grandan kvanton da petrolo, ĉar en la malnova Ĉinio preskaŭ tute ne ekzistis petrolo industrio. Dum la kvardek du jaroj de 1907 ĝis 1948, la totala longo de la boritaj oleoputoj atingis nur kelkajn dekmilojn da metroj. En la tuta lando malkovriĝis nur kvar malgrandaj oleokampoj kaj du gaskampoj, sin trovis nur ok malnovaj bormaŝinoj, dudek kvar geologiaj teknikistoj, kaj dudek kelkaj inĝenieroj en diversaj fakoj de borado, ekstraktado kaj rafinado. La plej alta jara produktkvanto de nafto estis naŭdek mil tunoj; estis nur naŭ specoj de oleoproduktaĵo, kaj tute ne estis fabrikado de oleoproduktaĵoj maŝinoj. Ĉiaj ekipaĵoj kaj instrumentoj por oleindustrio, inkluzive de ŝraŭboj, devis esti importitaj.

Post la Liberiĝo, la nova Ĉinio grandskale disvolvis sian ŝtonolean industrion. Dum la dek jaroj de 1949 ĝis 1959, la totala longo de la boritaj oleoputoj estas pli ol sepdek obloj de tiu de la malnova Ĉinio en kvardek du jaroj. Oleokampoj estis malkovritaj unu post alia en Hingiang, Siĉuan, Kinghaj k. a. Nun nia priesplorita provizo de nafto ĉiam pli grandiĝas, nia bezono de kruda oleo estas garantiita, kaj komplete bankrotis la aserto de imperiistoj ke “Ĉinio malhavas oleon”. En 1958, la produktkvanto de nafto

estis dudek kvar oblojn pli multa ol tiu en 1948. En la lastaj kelkaj jaroj, ĝia produktkvanto ankoraŭ pli multe kreskis. La specoj de oleoproduktaĵo ankaŭ rapide kreskiĝis. Nun kelkcent specoj de oleoproduktaĵoj povas esti produktataj en nia lando.

En Ĉinio, multaj modernaj oleminoj kaj oleorafinejoj jam establiĝis, formante bazojn de oleoproduktado.

Ankaŭ industrio de olemaŝinoj establiĝis ĉe ni iom post iom ĝis produkto de sufiĉe grandtipaj ekipaĵoj. Nun ĉiuj ĉefaj ekipaĵoj por esplorado, boro, ekstraktado kaj rafinado povas esti fabrikataj en Ĉinio. Ekzemple, la prilabora kapablo de la nove ekipitaj rafinejoj en 1963 estis kvaroble pli granda ol tiu en 1962.

Krome, la ĉinaj laboristoj jam mastras kompleton da teknikoj por serĉado, esplorado kaj konstruado de oleokampoj, kaj projektado kaj konstruado de oleorafinejoj. Grandaj rafinejoj projektitaj kaj konstruitaj de Ĉinio pruviĝis bonkvalitaj, kaj malmulte kostaj, kaj al ili progresintaj teknikoj estas aplikitaj. Nun, Ĉinio jam povas sendepende solvi gravajn problemojn en oleoproduktaĵo scienco kaj tekniko, kaj ellabori kompletajn projektojn por grandaj oleminoj kaj olerafinejoj, dank’ al la grandskala kresko de teknikaj fortoj.

La Origino de la Nomo “Ŝtonoleo”

Ŝen Gua (1031-1095 p. K.), scienculo kaj prefekto de Fujan en Song-dinastio skribis en sia verko *Notoj pri Menghi*:

“Ŝtonoleo estas produktata en Fujan. Tio estas la sama oleo produktata en Gaŭnu-gubernio menciita en antikva libro. Ĝi elfluas el sabloŝtonoj miksite kun fontakvo.” “Ĝi similas al lako, sed forte fumas kiam ĝi brulas. Kurtenoj de ĝi fumajitaj nigriĝas. Mi pensis ke ĝia fulgo povas esti utiligata, kaj kolektis ĝin por elfari inkon. La elfarita inkpeco nigre brilis kiel lako, pli bela ol tiu farita el pino-fulgo. Tial, mi faris tian inkon en granda kvanto, kaj ĝin nomis ‘Ŝtonsuko el Jan-rivero’. La inko, kiun mi la unua faris, estos vaste produktata kaj uzata en la mondo, ĉar ŝtonoleo estas neelĉerpebla produkto de la tero, malsimila al la pinoj kiuj povas esti elkonsumitaj.”

Kvankam Ŝen Gua tiutempe nur trovis ke la fulgo de petrolo povas esti uzata por fari inkon, tamen li estis la unua ĉino kiu ekuzis la nomon “ŝtonoleo”.

Kuraca Centro en Paŝta Regiono

ĈE la supera parto de Jili-rivero en Hingiang, pli ol sesdek kilometrojn okcidente de Ĝaŭsu-gubernio, estas kvietaj kaj pura domaro kun korto en verda arbaro. Tio estas la kuraca centro de la kvara popola komunumo de Ĝaŭsu-gubernio.

En la pasintaj dek kelkaj jaroj, la medicinaj laborantoj ĉi tie diligente servis por la sano de la kamparanoj kaj paŝtistoj. Ili ne nur radikale ŝanĝis la sanstaton de la kamparanoj kaj paŝtistoj en tiu malproksima regiono, sed ankaŭ disvolvis sian rondirantan kuracan taĉmenton en multe laŭdatan kuracan centron de popola komunumo.

Malfacila Komenco

En la jaro 1953 kiam glacio kaj neĝo komencis degeli, rondiranta kuraca taĉmento alvenis ĉi tien por fari medicinan laboron. Kun peza medikamenta kesto sur la dorso ĝiaj malpli ol dek anoj pene iradis sur kota kaj glita vojo sep tutajn tagojn. Tuj post la alveno ili vizitis ĉiutage tendojn kaj paŝtejojn, kuracante kaj propagandante pri higieno. Sed la friponaj sorĉistoj ĉien klaĉis: “Ĉu senbarbuloj kapablas kuraci?”

Frakasi tiun baron fariĝis ilia ĉefa tasko por disvastigi medicinan laboron.

Infekta malsano okazis en la familio de la paŝtisto Hasenbaj. Por sin kuraci la malsanulo trinkis oni ne scias kiom da “sankta akvo”, sed lia malsano ĉiam nur pli serioziĝis, kaj dudek kelkaj personoj de la tuta familio estis infektitaj. Aŭdinte tion, la kuraca taĉmento tuj sendis kuraciston, kiu piediris sur neĝo duonmetron profunda, por viziti la familion kaj doni senpagan kuracon al ili. Post atenta kuracado kaj prizorgo de la kuracisto, la tuta familio resaniĝis en malpli ol dudek tagoj.

Poste, pli kaj pli multe da homoj venis al ĝi por peti kuracon. Tiutempe, la vivkondiĉoj ne estis tiel bonaj en la paŝta regiono. Pro manko de domoj, la kuraca taĉmento pruntis unu ĉambron por sia bazo de kuracado, kaj la membroj rondiris laŭvice por doni sian medicinan helpon. En varmega somero, ili eliris ĉe tagiĝo, kunportante sekan manĝaĵon, kaj revenis nur en malfrua vespero. Ili spitis ventegojn kaj pluvojn kaj iafoje dormis ekstere. En frosta vintro, kiam la paŝtaj bestoj translokiĝis, kaj glacio kaj neĝo kovris la montaron, volvite en peltaj surtutoj kaj kun medikamenta kesto sur la dorso, ili iradis sur

altaj montoj kaj profundaj valoj. Rapide famiĝis la kuraca taĉmento tra la vasta stepo de Ĝaŭsu.

En Dek Jaroj

Post dek jaroj, la situacio ege ŝanĝiĝis! Origine, la kuraca taĉmento havis nur unu ĉambron, sed nun ĝi fariĝis popolkomunuma kuraca centro kun sufiĉa ekipaĵo! Estis ĉe ĝi diversaj ĉambroj por pacientoj, akuŝantoj, por operacio kaj ekzamenado al vizitantaj malsanuloj — sume 32 belaj ĉambroj; kaj krome estis pli ol dudek malsanulaj litoj, unu simpla operacitablo kaj kompleto da plej necesaj kuracaj instrumentoj Ĉio ĉi tio estas kreita de laborantoj de la kuraca centro per siaj laboremaj manoj.

En 1958, post kiam la komunumo establiĝis ĉi tie, la kuraca taĉmento pligrandiĝis en kuracejon kun financa subteno de la ŝtato. Poste, ili larĝe etendis la konstruon de la kuracejo per siaj propraj manoj: ili mem alportis lignojn kaj terbrikojn, stukis la murojn, sen malhelpo al la kuracaj laboroj. La najbaraj loĝantoj ankaŭ aktive ilin helpis. Tiel, ili konstruis en unu fojo dek kvar novajn ĉambrojn.

Utiligante la libertempon, ili ekspluatis tiujare du hektarojn da virga tero, kaj akiris abundan rikolton. Ĝojplene ili vendis la grenojn al la ŝtato, kaj aĉetis per la ricevita mono dek litojn por malsanuloj, dek pajlajn matracojn, dek lankovrilojn, tabletojn, kraĉaj-ujojn kaj grandan keston da medicinaj instrumentoj. Telefono sonoris, elektro-lampoj brilis, dek simplaj litoj kaj du ĉambroj de vaporbano ekfunkciis. La kuracejo fariĝis kuraca centro kiu povis doni servon de hospitalo. La tekniko de la kuracistoj pli kaj pli perfektigis dank’ al ilia senĉesa studo, kaj ili jam povas fari eĉ la ordinarajn abdomenoperaciojn.

Ĉiam por la Malsanuloj

En iu printempa vespero en 1963, ĝuste kiam la kuracistoj kaj flegistoj revenis de rondvizito al malsanulaj ĉambroj, eksonoris la telefono. De la urĝa voĉo, la kuracisto sciigis ke iu serioze malsaniĝis. Li tuj kunportis la medikamentan keston kaj forgalopis sur ĉevalo. Kiam li venis al la malsanulo, li trovis ke tiu ĉi suferas de akuta abdomena malsano, kio postulas tujan operacion en la kuraca centro. Ĉar la afero estis urĝa, eĉ minuton oni ne devis perdi, sed la paciento ne povis toleri skuon sur la ĉevalo, kion fari? La kuracisto tuj surdorsigis lin kaj iris piede. Ĉar la vojo estis tro longa, li ne havis sufiĉan forton lin portadi, li trovis forkon de arbobranĉo, surmetis pajlojn, kuŝigis sur ĝi la pacieron kaj trene portis lin en la kuracan centron. Post pli ol du-hora urĝa operacia kuracado, la paciento eldangeriĝis.

“Sin urĝi pro la urĝa bezono de la pacientoj kaj dolori pro iliaj suferoj” estas la principo observata de ĉiu revoluciema medicina laboranto, kaj ili ĝojas pro tio ke ili povas servi al la laboranta popolo, por kiu neniam antaŭe ekzistis kuraca rimedo.

Urĝsava Taĉmento el Vojaĝantoj

EN aŭgusto, 1963, la urbo Gaŭjang en la centro de Hebej-provinco estis sturmata de inundo. En la streĉa lukto kontraŭ la superakvego heroe batalis sub la gvido de sia portempa partia filio iu urĝsava taĉmento kiu ĉiam tuj aperis kie ĝi estis bezonata, kaj luktis kelkajn tagnoktojn por sekurigi la vivojn kaj posedaĵojn de la popolo. Post la inundado, kiam oni iris por danki ilian sindonan helpon, tiu partia filio jam ne plu ekzistis kaj ĝiaj membroj jam malaperis. De kie ili venis? Kaj kien ili iris? Apenaŭ iuj tion scias. Tamen, iliaj kortuŝaj heroaĵoj estas pli kaj pli vaste famigitaj, de domo al domo, de homo al homo.

Jen la okazaĵo:

PORTEMPA PARTIA FILIO

Nokte de la 9-a de aŭgusto, tranoktantaĵoj en la "Amaso"-hotelo sur la Norda Strato de Gaŭjang subite aŭdis teruran novaĵon: Digoj de la du riveroj Ĝulong kaj Tang breĉiĝis kaj altaj fluo-krestoj rekte sin ĵetis al la urbo. En tiu momento, iu majoro de la Popola Liberiga Armeo ekstaris alvokante: "Kamaradoj, nun inundo minacas nian urbon, ni gardu la vivojn kaj posedaĵojn de la loĝantaro kune kun la popolamasoj!"

Apenaŭ li finparolis, tuj eliris el la homamaso sub-leŭtenanto de la aerarmeo Deng Tongkjuan dirante: "Mi estas komunisto, sendu min kien ajn laŭ-bezone!"

Sekve, du artilerianoj brave stariĝis: "Dirite, farite. Kamarado, tuj donu ordonojn!" Ankaŭ unu

kamaradino sin anoncis: "Mi estas Liu Jupu, komunisto, policano de la urbo Baŭding. Ankaŭ mi iros batali kontraŭ inundo kune kun kamaradoj!"

Krom batalantoj kaj demobilizitoj de la Popola Liberiga Armeo, sin anoncis post ili kadroj de partiaj kaj registaraj organizaĵoj, aĉetistoj de financaj kaj komercaj oficejoj, studentoj hejmenirantaj por pasigi la someran libertempon, laboristoj kaj popolkomunumanoj. Kvankam ili ĉiuj estis preterpasantaj vojaĝantoj tamen neniu el ili volis ĉestari flegme kun krucigitaj manoj en tia kriza momento. Ilia entuziasmo kaj batalvolo kortuŝis la majoron, kiu diris emocie: "Mi estas nomata Ĉen Mingkjuan, por savi la popolon el la katastrofo, mi decidis lukti ĝisfine kune kun vi ĉiuj. Ni, partianoj kaj membroj de la Komunisma Junulara Ligo tuj nin organizu por establi portempan partian filion, kaj iru al la gubernia partikomitato por peti taskon."

GARDI VARTENEJON

Kiam Ĉen Mingkjuan haste atingis la oficejon de la Gaŭjang-gubernia komitato de la Ĉina Kompartio, oni tie intense sin okupis pri asignado de fortoj por kontraŭbatali la inundon. Ĉen donis unue al la sekretario de la gubernia komitato nomliston de la membroj de la provizora partifilio, kaj poste urĝeme raportis kaj elkore petis: "Nia filio organiziĝis el kelkdek vojaĝantoj. Ni petas, ke la gubernia komitato aprobu ĝin kaj tuj donu la plej malfacilan taskon al ni."

La sekretario de la gubernia komitato kompartia faris paŝojn al li kaj kaptis liajn manojn dirante: "Brave! Vi ja meritas la nomon de bonaj batalantoj de la popolo. La gubernia komitato sankciis vian portempan organizon de partia filio." Kaj li tuj ordonis: "Nun la tenejo de la urba magazeno estas en danĝero, tien rapidu por ĝin protekti!"

La magazeno sin trovas ĉe la sudokcidenta angulo de la urbo, ĉirkaŭ ĝi staris digo ĉirkaŭ du metrojn alta. En tiu momento, ekster la digo formiĝis maro de inundakvo, nur unu ŝoseo kun relative alta voj-bazo ligis la vartenejon kun la urba digo. En la tenejo sin stokis la ĉiutagaj bezonaĵoj por centoj da miloj da popolanoj de la tuta gubernio. Se la digo estus breĉita, tio kaŭzus grandegajn damaĝojn.

Kiam la urĝsava taĉmento estrata de Ĉen Mingkjuan atingis la tenejon, jam tagiĝis, kaj la pluvego ĵus ĉesis. Apenaŭ ili haltis tie, la sekretario de la partifilio en la magazeno tuj diris: "Nun la okcidenta digo estas en plej urĝa danĝero, tiu sektoro estas plej forte atakata de la inundakvo, kaj la akvosurfaco estas nur je kelkaj centimetroj sub la supro de la digo. Ĉen Mingkjuan diris kun decidemo: "Ni iros tuj!" Kaj li kuris al la okcidenta digo gvidante ĉiujn.

Kiam tiu trupo de freŝaj fortoj atingis la digon, iuj el ĝiaj anoj portis teron, aliaj ŝlimon, kun granda

rapideco ili plialtigis kaj solidigis la digon kaj tio mildigis portempe la danĝeron en la okcidento. Apenaŭ ili venis el la streĉiĝo, subite aŭdiĝis alarma fajfado kaj kriegoj: "Rapidu ĉi tien! Estas danĝere!"

Ili trovis, ke nordoriente de la vartenejo aperis danĝero, kie la digo estis breĉita kaj la digobazo enfalis. Ĉen Mingkjuan tuj rapidis kun sia taĉmento rekte al la nordoriento. Atinginte la danĝeran sektoron, la batalantoj tuj sin ĵetis en la akvon, enbatis palisojn kaj dorsportis teron, malgraŭ ke ili estis tiom lacaj, ĉiuj laboregis energie. Kiam ili denove venkis la danĝeron, ili vidis, ke la unuafoje aperinta suno dum duonmonato jam subiris okcidente. Ili ne matenmanĝis, nek tagmanĝis, la intensa lukto forgesigis ilin pri malsato.

La streĉan tagon tuj sekvis streĉa nokto. Subite ekventegis, kaj sovaĝiĝis la ondoj, forte atakante la digon ĉirkaŭ la vartenejo. La provizora partia filio kunvokis urĝan kunvenon kaj faris du decidojn: unue, ĉiuj komunistoj, armeanoj, lokaj kadroj ne forlasu la digon dum la nokto, laŭvice gardstaru kaj estu ĉiam pretaj por urĝsavado; due, kopiu kelkdek ekzemple-rojn de la simpla persona kariero de ĉiu taĉmentano, kaj disdonu ilin al la anoj por ke ili portu ilin kun si en la sino, tiel ke oni povu sciigi al la koncerna organizo, se iu oferos sian vivon por la sekureco de la popolo.

Tiun nokton, kun la komunistoj kiel siaj ekzemplaj, ĉiuj taĉmentanoj deĵoris sen ripozo. Ili aldonis teron al la supro de la digo korbon post korbo, enbatis al la digo palison post paliso, tiel ke kun la leviĝo de la akvo altiĝis ankaŭ la digo kaj ju pli furioziĝis la akvoatakoj, des pli firmiĝis la digo.

Ĉe la tagiĝo, denove ekfajfis alarmo. Sub la gvido de Ĉen Mingkjuan la taĉmento kuratingis la sektoron alarman kaj rimarkis, ke la digo ĉe la nord-okcidento de la vartenejo estis larĝe breĉita, kaj inundakvo terure invadis en la tenejon, kaj minacis ĝin per tuja detruo. Sub la gvido de la aeroarmeasubleŭtenanto Deng Tongkjuan kaj la artileriano Ĵen Ŝitoŭ batalantoj tuj sin ĵetis en la breĉon kun tersakoj, kaj sin premis al la sakoj por ŝtopi la breĉon, kaj laboristoj kaj oficistoj sekvante ilian ekzemplon, unuj post la aliaj, sin ĵetis en la akvon, kaj tiel baris la ferocan torenton. Nelonge poste, la gubernia komitato alsendis pli ol tricent laboristojn, kiuj streĉe luktis du horojn, kaj finfine firme fermis la breĉojn kaj la vartenejo tiel saviĝis.

En malnova socio de Ĉinio estis popola diro: "rigardi iun kiel preterpasanton" por esprimi la indiferecon al iu. Tamen por tiuj "preterpasantoj" de la nova socio jam tute ne validas la origina signifo de tiu malnova diro.



Frukto-rikoltado

VEJ GUANG

*Jen bunta bel' ornamas la vesper-firmamenton,
kaj l' bordaj liĉi-fruktoj* ruĝigas la torenton;
sur boatetoj, kiuj ripozas en trankvilo,
knabinoj fruktrikoltas, babilas la ĝojsenton.*

*Ŝipetoj jen fruktplenaj rapidas orienton,
al urboj ili faras bonvenan fruktosendon,
kun kantoj delikataj postkuras la plen-lunon,
lasante post si ombbron la ruĝan kaj silenton.*

* Liĉio (Nephelium Litchi), fruktarbo origine kreskanta en suda Ĉinio. Ĝi donas grandajn grapolojn de ruĝaj fruktoj tre bongustaj.

Printempa Pluvo

HONG FENG

*Printempan pluvon lulas facila jen zefiro,
ĝardenoj freŝe ruĝas kaj verdas parcel-milo;
la semo-selektantoj de l' popolkomunumo
ridetas pro l' duŝanto al floroj kaj al humo.*

Konkurse kun Printempo

HONG FENG

*Al brizo jen ridetas la persikflor-arbaroj,
en kiuj la semantoj kaj sterk-disportaj ĉaroj
de l' komunumo viglas konkurse kun prin-
tempo,
kaj l' floroj kaj l' vizaĝoj ruĝiĝas en sun-
tempo.*

TRAD. LAŬLUM

La Belaj Trajtoj de Baŭrgaj-agrofarmo

MI estis survoje al la Baŭrgaj-agrofarmo.

Mia aŭto forlasis la novan urbon Bajangaŭle, kie troviĝas la sidejo de la Bajannar-distrikta Oficejo, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, trapasis zonon post zono de kontraŭventaj forstoj kaj finfine turniĝis de la ŝoseo—ni alproksimiĝis al la Farmo. Sablaj montetoj leviĝas unuj post aliaj kvazaŭ ondegoj en la flava maro, kiu sin etendas malproksimen ĝis la horizonto. Obstinaj vegetaĵoj kiaj sabloartemizoj kaj sovaĝaj ĉerizoj fiere staras sur la sablomontetoj, sed tiel maldensaj ili estas, ke ili neniel povas ŝanĝi la koloron de la vastega dezerto.

Tuj kiam mi elaŭtiĝis ĉe la ĉefa Farmo, venis al mi maljunulo ĉirkaŭ kvindekjara. La ŝoforo lin konigis al mi: “Jen nia farmestro, diru al li, se vi ion volas.”

Post atenta rigardo, mi rekonis en tiu maljuna farmestro k-don Juan Ŝusen mian unuan superulon post mia partopreno en la revolucio. Mi prementis la manojn de la maljunulo, kaj ne sciis kion diri pro ĝojo. La farmestro etendis la brakon, ĉirkaŭprenis min kaj diris: “Jam dek jarojn ni ne vidis unu la alian. . . .”



Ilustraĵoj de Haŭ Hongĝang

Enirinte lian domon, unue ni babiladis pri la nuna stato de la malnovaj kunbatalantoj, kaj poste mi revenis al la temo pri li mem kaj demandis: “Kiel vi fartas dum la lastaj jaroj?”

“Estas strange”, diris la maljunuloj, “ke ekde la antaŭlasta jaro kiam mi alvenis al la agrofarmo, kvankam tage mi ruliĝas inter la sablomontetoj, nokte mi dormas en la tendo, manĝas bakitan rizon kiam mi malsatas, deŝiras sovaĝajn ĉerizojn kiam mi soifas, tamen mia antaŭa malsano malaperis. Mi pensas ke mi ne volonte min donos al la Morto, se mi ne povus per miaj fortoj starigi kvin agrofarmojn tiom grandajn.” Tiam la estro ekridegis sonore.

Mi estis profunde kortuŝita de lia junece fervoro, sed mi ne povis solvi mian dubon pri tio ke kiom da profito povas doni tia farmo inter la sablomontetoj. Malkaŝeme mi diris al li la penson. “En la aŭtuno de la pasinta jaro,” emociie diris la maljuna farmestro, “la Sinteza Esplora Grupo de la Ĉina Akademio de Sciencoj asertis, ke sub tiuj sablomontetoj troviĝas glueca grundo kiu, miksite kun sablo kaj irigaciite per akvo el la Flava Rivero, fariĝos tre fekunda! La trunka irigacia kanalo de nia farmo jam estas finfosita, do baldaŭ ŝanĝiĝos la fizionomio ĉi tie.”

Ĉe la tagiĝo de la sekva mateno, li kondukis min al la Dua Kultiva Sekcio. Kiam ni iris sur la digon de la kanaletoj li diris: “Tiu ĉi trunka kanaletoj estas fosita per vento laŭ la propono de iu mongola maljuna paŝtisto.” Kun miro mi demandis: “Kiel vento povas tion fari?” “Nun mi ne diros,” ridante diris la maljuna farmestro, “vi povos mem vidi en la posttagmezo kiam furiozos la sesagrada ventego.”

Ni transiris lignan ponton, malsupreniĝis de la digo, kaj atingis la Duan Kultivan Sekcion. Sur la vasta ebenaĵo regis batalkampa atmosfero: gigantaj buldozoj kaj diskoerpiloj tirataj de po kvar ĉevaloj estis ebenigantaj sablomonteton, kaj post ili homamasoj fosis novan kanaleton.

Ĝuste kiel la maljuna farmestro diris, je la dua horo posttagmeze venis la ventego kiu nin metis en alian mondon de flava malheleco.

Tiam la fosantoj krias, kuras kaj svingas fosilojn. Sub la sablomonteto oni starigis du paralelajn murojn

el pajlo. Senfinaj homvicoj klopodis ilin teni. La ventego trablovis la intermurejon kaj forportis la sablon, kaj tiamaniere fosis per mirakla forto la kanaleton en dezerto laŭ la volo de la laborantoj.

Vespere, kiam finiĝis la laboro, la maljuna farmestro iris al la grupo de maŝinplugado, mi revenis sekvante iun knabinon nomatan Ma Lan, membro de la Dua Kultiva Sekcio. Ŝi estis nur 17- aŭ 18-jara, gradiĝinto el malsupera mezlernejo, knabino kvieta kaj varmkora al la aliaj. En ilia sekcio ankoraŭ ne troviĝis eĉ unu domo. Ĉiuj laborantoj loĝis en feltaj tendoj. Ĉe la pordo de la tendo, en kiu loĝis Ma Lan, oni flegis tri tufojn de *malan*-floroj (*Iris ensata*) Ĝiaj malhele verdaj, vivoplenaj folioj kaj violaj floroj kun purpuraj vejnoj balancis sin en la vespera venteto.

“Ĉu ankaŭ ĉi tie kreskas *malan*-floroj?” mi demandis kun scivolo.

Ma Lan diris al mi: “Tion ĉi alportis la maljuna farmestro speciale el Ulat-flago*. Li diris ke *malan*-floro nek sekiĝas de sunbrulo, nek pereas en inundakvo, nek rompiĝas de ventego, kaj povas kreski kie ajn ĝi plantiĝas. Ni scias kion signifas lia diro. Li esperas, ke ni junuloj ĉiuj estu kiaj la *malan*-floroj estas.”

Matene de la tria tago, kiam mi forlasis la Baŭrgaj-agrofarmon, la estro kolektis por mi sovaĝajn ĉerizojn kiel donacon kaj min adiaŭis ĉe la aŭto. Subite iu kriis: “Jen, miraĝo!”

Mi ekrigardis malproksimen: ondas kaj trembrilas vasta blublua maro, en kiu staras inverse ruĝaj domoj, verdaj arbaretoj, oraj kampoj kaj arĝent-blankaj ŝafgregoj. Vidante la scenon, mi ellasis el mia buŝo: “Kiam oni povos fari nian Baŭrgaj tiel bela?”

“Tio dependas de tio kiel ni ĉiuj ĉe Baŭrgaj klopodos por ĝia bela estonto,” diris emociite la maljuna farmestro.


Tempo forflugadas kaj jam forpasis du jaroj. Antaŭ kelkaj tagoj, Ma Lan revenis al Huhehot por libertempado. Ŝi alportis leteron de la farmestro, kiu skribis ke la 1000 hektaroj da virga tero kiujn oni prisemis lastjare, akiris abundan rikolton. Ankaŭ la legomoj kaj fruktoj en la ĝardenoj ne malbone kreskas. . . . Kamaradoj de la forstejo eĉ kreskigis apud Baŭrgaj kontraŭventan forston sur areo de pli ol 500 hektaroj. Sed bedaŭrinde jam ne plu eblas fosi kanaleton per forto de la vento.

Ma Lan ankaŭ diris al mi, ke Baŭrgaj-agrofarmo nun jam havas kvin kultivajn sekciojn. Jam delonge la laboristoj transloĝiĝis en la novajn brikajn domojn kun tegola tegmento. Kaj en iliaj domoj instaliĝis elektraj lampoj. Ĉiu kultiva sekcio havas sian bibliotekon kaj klubon. . . . ŝi parolis tiel ekscitite, ke antaŭ miaj okuloj denove aperis la bela sceno kun ruĝaj domoj, verdaj arbaroj, oraj kampoj, arĝente blankaj ŝafgregoj. . . .

* *flago*=administra unuo en Interna Mongolio egala al gubernio.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

NOVA INFORMO PRI LA REVIVIGITA MANO



Juna laboristo Vang Cunbaj, kies fortranĉita dekstra mano estas revivigita, jam reiris al sia laborposteno je la 19-a de la lasta februaro.

Antaŭ forlaso de la hospitalo oni faris detalan ekzamenon pri la revivigita mano kaj trovis, ke la ostoj bone kunkreskiĝis, eĉ postsigno de la rekunigo estas apenaŭ rimarkebla. La karno de la mano renormal-

iĝis. Sento pri malsamaj materialoj jam parte restatiĝis. Pri mov-funkcioj, la mano povas jam preni, porti desupre, kunpremi per fingroj, movi turne k. s. Nur solidan pugnon li ankoraŭ ne povas fari.

Nun li laboras kiel kontrolisto de produktaĵoj en sia antaŭa fabriko. Kaj li bone plenumas sian taskon. Por plena normaliĝo de la funkcioj de la mano fizikterapio ankoraŭ daŭras.

“VOJO, NIA PEN’” kaj

Vojo, Nia Pen’

Muziko de Hian Hinghaj
Teksto de An-O
Esperantigis Eltunko

Moderate, bone markate




Vo- jo, ni- a pen', he jo! Ar- bo, ni- a



sem', he jo! kaj ĉi- el- skra- pant' el ma- noj



de ni mem, he jo! de ni mem, he jo!



Bra- vaj vi- roj sen ce- dem', Bra- koj fe- raj por la ter- e-



den', he jo! por la ter- e- den', he jo!

Ĝia Komponinto



LA muziko de la kanto *Vojo — Nia Pen'* estas verkita de la ĉina granda komponisto Hian Hinghaj (1905-1945). Li kaj alia granda komponisto Nie Er kune portas la titolon de "fondintoj de la nova nacia muziko de Ĉinio".

Hian Hinghaj, filo de fiŝisto kaj vilaĝano, naskiĝis ĉe la bordo de la bela Perlo-rivero en la plej suda parto de Ĉinio. Ekde sia infaneco li ricevadis la influon de la revolucia ideologio de la laboranta popolo. Post diplomiĝo el universitato en la aĝo de 25 jaroj, li iris al Parizo por studo de muziko. Estante 31-jara li revenis en la hejmlandon ĝuste kiam la japana imperiismo en konspiro kun la kuomintang-a reakciularo faris kruelan subpremon al la ĉina popolo. Kun arda patriotismo li tuj sin dediĉis al la nacistava movado de la popolamaso uzante muzikon kiel sian batalilon.

En 1938, kiam batalfajro ekflamis kontraŭ la japanaj invadantoj tra la lando, li iris al Jan-an, la lulilo de revolucio kaj la plej malfacila regiono en tiutempa Ĉinio. Tie li laboris kiel estro de la muzika fakultato en la Lusin-a Kolegio de Literaturo kaj Arto kaj dume havis la plej kreivan periodon de sia komponista vivo. Li verkis tiam la operon *Marŝo de Soldatoj kaj Popolanoj*, la epokfarajn *Kantato pri la Flava Rivero*, *Kantato de Produkto*, k. a. kiuj plej vaste populariĝis en ĉiuj bazlokoj de la Kontraŭjapana

Rezistmilito, kaj forte kuraĝigis la batalantan popolon.

En majo de 1940 li veturis al Sovetunio kaj finis tie siajn verkojn *Nacio-simfonio* (la Unua Simfonio), *Sankta Milito* (la Dua Simfonio) kiujn li komencis jam antaŭ longe en Ĉinio. En 1945, li finis sian lastan verkon *Rapsodio pri la Patrio* dum li serioze malsaniĝis, kaj la morto lin forrabis de ni la 30-an de oktobro, tiujare.

Li verkis muzikon por ĉ. mil kantoj inkluzive de tiu por memorigi la 50-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, 8 grandajn orkestrajn muzikojn, 1 operon, 3 kantatojn kaj nombron da pianokaj violono-soloj. Ĉiuj ĉi verkoj plene spegulas la spiriton kaj volon por la revolucia batalo de la ĉina popolo kaj estas karakterizitaj de kristala kaj gustriĉa nacia stilo. Ili multe riĉigis la trezorejon de muziko de la ĉina popolo.

Vojo — Nia Pen' estis verkita de li en 1940 antaŭ ol li vojaĝis eksterlanden. Tiam la ĉina popolo travivis siajn plej malfacilajn tagojn dum la rezistmilito kontraŭ la japanaj invadantoj: unuflanke, la japanaj imperiistoj kruele "trabalais" la japanrezistajn bazregionojn; aliflanke, la kuomintang-a reakciularo faris komploton kun la malamiko levi altan tajdon kontraŭkomunistan. Tamen la ĉina popolo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, neniom timis kaj donis tuj rebaton

meritan por la malamikoj. Tiu ĉi kanto profunde spegulis la heroon de la ĉina revolucia popolo, kaj ĝi ankaŭ donis al la revolucia popolo grandan instigon kaj kuraĝigon tiutempe.

La kanto estas mallonga, tamen ĝiaj vortoj estas kristalaj kaj melodio estas forte vigla, riĉa je nacia gusto kaj tajdas en ĝi nemezurebla revolucia entuziasmo de memfidaj batalantoj. Ankaŭ tio klarigas al ni kial la kanto ne nur estis ŝatata de la ĉina popolo dum la severa kaj malfacila sed firmdecida batalo kontraŭ la agresantoj, sed ankaŭ estas ŝatata nun dum la konstruado de socialismo dank' al sinapogo sur siaj propraj fortoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ

STUDO DE ĈINA MUZIKO

La Instituto de Ĉina Muziko multe kontribuis por la heredo kaj disvolvo de la ĉina muziko en la lastaj dek jaroj depost ĝia fondiĝo. Ĝi kolektis kaj ordigis multajn muzikajn literaturojn, inkluzive 12,000 muzikajn verkojn (sume 300,000 volumoj), pli ol 40 specojn de muzikaj skriboj, 287 manuskriptojn. Nun en la instituto troviĝas pli ol 500 specoj de enlandaj muzikiloj de 21 nacioj kaj pli ol 90 de 25 fremdaj landoj. Ses muzikaj libroj estos eldonitaj ĉijare rezulte de la studado.

Filatelio en Ŝanhajo

JAM antaŭ la Liberiĝo Ŝanhajo estis unu el al filatelaj centroj en la lando, sed la tiama filatelia merkato estis nur tereno por ĉasantoj de profito. Amatoraj filatelistoj, kiuj volas kolekti siajn ŝatatajn poŝtmarkojn, ofte ilin pagis kare kaj spertis multajn malfacilojn. Tiam la filatelio iris tie sur la malĝusta vojo. Poŝtmarkoj estis rigardataj ne kiel artaĵo por esti kolektata kaj aprezata, sed kiel varo profitodona. Estis evidenta ekzemplo ke tiam ĉiuj konkure kolektis “nenormalajn” kaj “maloftajn” markojn. Se oni nur trovis markojn inverse stampitajn, erare presitajn, duoble stampitajn aŭ kies emisio jam elĉerpiĝis, oni rigardis ilin kiel trezoron, kaj volis tuj al si havigi, sed la vendisto la prezon centoble

altigis. Post la Liberiĝo, tiu ĉi nenormala agmaniero estis likvidita paŝon post paŝo, sekvante la ŝanĝigon de la socia fizionomo. Nun filatelio estas rigardata kiel utila kultura aktivado kaj komencas sane disvolviĝi.

En Ŝanhajo nun troviĝas centmiloj da filatelaj amatoroj. Plejparto el ili komencis kolekti poŝtmarkojn post la Liberiĝo. Laboranto de la Ŝanhaja Filatelia Kompanio iam faris intervjuon al filatelistoj kaj demandis kiel ili komencis kolekti poŝtmarkojn. Iliaj respondoj estas tre interesaj. Grandparto el ili diris ke hazarde ili vidis belajn poŝtmarkojn, — kelkaj aprezis ties desegnojn, kelkaj ties enhavon kaj subjekton, — kaj iom post iom ili faris al si la kutimon de kolektado. Iu laboristo

de porcelana fabriko komencis kolekti post kiam li vidis la poŝtmarkojn por memorigo pri la 26-a Tutmonda Ĉampionea Turniro de Tablotenis. Nun li jam kolektis ĉiujn seriojn de poŝtmarkoj eldonitaj en nia lando post la Liberiĝo kaj de multaj novaj kaj malnovaj poŝtmarkoj eksterlandaj. Kiam iu magazena komizo dekoraciis la montrofenestron por naĝkostumoj, li imitis la desegnon kaj kolorojn de la poŝtmarkoj de “Ora Fiŝo” kaj bone sukcesis. Kaj poste li fariĝis filatelia amato. Alia laboristo de iu fabriko de radioekipaĵoj vizitis sian amikon por peti referencan materialon pri instalado de radio-aparato. Okaze en lia albumo li vidis serion de ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj emisiitaj memore al la inventinto de radio. Sur ĉiu marko estas diagramo de la radiaparata cirkvitliniaro. Tiuj markoj vekis lian intereson pri filatelio, kaj li envicigis al la kolono de filatelistoj.

En la lastaj jaroj furoras filatelio de speciala subjekto, t.e. kolektado de ĉiuj serioj de poŝtmarkoj pri la aparta temo laŭ la gusto de la kolektanto. Ekzemple, homoj, animaloj, floroj, sportoj, literaturo kaj arto, scienco kaj tekniko, militaj aferoj, festotagoj, ktp., ĉiuj ili estas specialaj temoj ŝatataj de multaj amatoroj. Filatelistoj ŝatantaj literaturon, ofte preferas kolekti poŝtmarkojn kun portretoj de literaturistoj de diversaj landoj; laboristoj de ŝipkonstruo fervore kolektas markojn kun ŝipoj; oficistoj kaj studentoj ŝatas kolekti poŝtmarkojn memorigajn pri revoluciaj movadoj; studentoj de arĥitekturo kolektas poŝtmarkojn pri la dek grandaj



Ĉen Joŭgen, laboristo de la Ŝanhaja Turbin-fabriko montras sian kolekton de poŝtmarkoj kaj konigas sian sperton pri ilia konservado kaj kontrolado.

Foto de Feng Pejŝan

konstruaĵoj en Pekino kaj la famaj konstruaĵoj en aliaj landoj. Tia kolektado povas pligrandigi la intereson pri iu fako, plivastigi la vidkampon, plimulti la scion kaj altigi la aprezan nivelon de la poŝtmarko-kolektantoj.

Por faciligi la filatelian aktivadon de la loĝantoj, la Ĉina Filatelio Kompanio establis filion en Ŝanhajo. En ĝia vendejo svarmas homoj de mateno ĝis vespero, precipe dum ferioj aŭ la tagoj kiam oni komencas la vendon de nove eldonitaj poŝtmarkoj.

La filatelio kompanio konstante tenas en sia stoko milojn da diversspecaj poŝtmarkoj por libera elekto de la klientoj. La vendistoj akceptas milojn da klientoj ĉiutage. Ili estas spertaj pri la specoj kaj formoj de poŝtmarkoj emisiitaj en diversaj landoj kaj ankaŭ povas bone konjekti la malsamajn postulojn kaj gustojn de la klientoj kaj servas kiel iliaj konsilantoj. Ekzemple, kiam patrino alkondukas infanon por aĉeti poŝtmarkojn, la vendistoj proponas do

poŝtmarkojn pri scienco kaj tekniko, animaloj, sportoj kaj floroj. Kiam alvenas al la montrablo studento portanta insignon de muzika instituto, la vendisto lerte elektas kaj montras al li memorigajn kaj artajn poŝtmarkojn kun portretoj de muzikistoj de diversaj landoj. Foje, iu kuracisto petis la vendistojn kolekti por li poŝtmarkojn kun portretoj de medicinistoj. Ili elprenis ĉiujn poŝtmarkojn kun la portreto de la famaj medicinistoj en la antikva Ĉinio, kiel Li Ŝiĝen k. a. Ĝuste en la tempo de ekspedo, subite ili pensis pri Sun Jatsen kaj Lusin, kiuj ankaŭ lernis medicinon dum sia juneco, sekve ili aldonis ankaŭ tiujn ĉi du seriojn, tiel ke la elektitaj poŝtmarkoj konsistigis plenan kompletan. Tio gajnis multan laŭdon de la kliento.


Por helpi al la filatelio amatoj loĝantaj en la malproksimaj kvartaloj aŭ tre okupataj de laboro, la filatelio kompanio regule sendas la antaŭmenditajn poŝtmarkojn al la domoj de la kolektantoj.

La filatelio aktivado en fabrikoj kaj lernejoj disvolviĝas tagon post tago, kaj ĝi viglas precipe en lernejoj. La studentaj unuiĝoj de multaj lernejoj havas sian filatelian sektion, kaj filatelio fariĝas unu el la kulturamuzaj aktivadoj postlecionhoraj. Instruistoj de elementaj lernejoj, utiligante la filatelian ŝaton de la infanoj, prenas la poŝtmarkojn kiel instrumaterialon, kaj kondukas la lernantojn al kulturigado de ĝusta intereso pri filatelio, tra kiu ili grandigas la kampon de scio, kaj kulturigas la intereson de lernado. La monata gazeto "Filatelio" eldonata de la Popola Poŝt-telkomunika Eldonejo havas grandan nombron da legantoj en Ŝanhajo.

La Filatelio Kompanio ĉiam kunlaboras kun la filatelioj societoj kaj individuoj, en organizado de ekspozicioj, raportaj kaj diskutaj kunvenoj kaj aliaj aktivadoj. Depost 1957, oni jam okazigis pli ol dudek ekspoziciojn de poŝtmarkoj, el kiuj la pli grandaj ekspozicioj elmontris po pli ol dekmil pecojn, kiuj altiris vastan intereson de la urbanoj.

ŜTONLEONO ANTAŬ 1900 JAROJ

Tiu ĉi ŝtonleono estis farita en la fina periodo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Ĝi troviĝas nun en la halo de grandaj ŝtonskulptaĵoj en la Ŝenhi-a Muzeo



en Hi-an, kies inaŭgurado okazis antaŭ nelonge.

La ŝtonleono kun kapo levita, dorso arkigita kaj postkruro etenata vivece montras sin majesta, vigla kaj eksaltanta. La dika longa vosto strekas fortan arkklinion tiel ke la leono aspektas pli feroce ol la reala.

Por diri strikte, preskaŭ en neniu parto ĝi estas proporcia kompare kun la vivanta. Tamen ĝuste pro la aŭdaca hiperbolo de la artisto ĝi impresas rigardantojn per beleco kaj forto.

KURIOZAĴO EN LA REGNO DE PLANTOJ

— La Natura Larmiga Bombo —

En la arbaroj okcidente de Pekino troviĝas speco de fumo-fungo. Science ĝi estas nomata lasiosphaera, sed la lokanoj ĝin nomas "diabla fumanto". Ĝi aspektas kiel pilketo, kiu, ĉe maturiĝo, plenas de nigra pulvoro. Se vi ĝin piedpremas senatente, ĝi eksplodas per nigra pulvoro en densa fumo, kiu penetras en viajn nazoj kaj gorgon ĝis elfluo de larmoj kaj nazmuko pro netolerebla tiklado. La juna fumo-fungo estas manĝebla kaj la maturiĝinta bone servas en la ĉina farmacio kiel kontraŭinflama sangohaltigilo. Ĝi povas, laŭdire, kuraci sangosputadon, sangadon k.a. Ĝi ankaŭ kuracas tonsiliton.

Kion Diras la Serpent-kaptisto

LIU ZONGJUAN

EN la ĉirkaŭaĵo de Jongĝoŭ sin trovas strangaj venenaj serpentoj, kies nigran korpon ornamas blankaj strioj. Se ili tuŝas herbojn aŭ arbojn, la herboj kaj arboj ĉiuj forvelkas; se ili mordas homojn, neniu el ili povas ilin rezisti. Tamen se oni kaptas kaj sekigas ilin por medicino, ili povas kuraci lepron, rigidan kurbigon de membro, hemoroidon kaj ulceron, forigi la putriĝintan karnon kaj mortigi la malsanigajn vermojn. En la komenco la imperia kuracisto ordonis kolekti tiajn serpentojn per dekreto de la imperiestro, du-foje en ĉiu jaro. Tiuj, kiuj kapablas kapti ilin, estas ĉie varbitaj kaj ilia imposto povas esti pagita per la kaptajo. La loĝantoj de Jongĝoŭ konkure okupiĝas pri tio.



Estas iu nomata Giang, kies familio ĝuas tiun anstataŭpagon jam tri generaciojn. Demandite de mi, li respondis: “Mia avo mortis pro tio. Ankaŭ mia patro mortis pro tio. Mi daŭrigas la okupon jam dek du jarojn kaj preskaŭ mortis kelkajn fojojn.” Parolante li mienis tre malĝoje.

Ankaŭ mi malĝojiĝis kaj diris: “Ĉu ĝi estas doloriga al vi? Lasu min diri al la koncerna instanco por ŝanĝi vian servon kaj denovigi vian pagadon de imposto. Ĉu bone?”

Tiu Giang ege malĝojiĝis kaj respondis kun larmaj okuloj: Ĉu vi volas min kompati, ke mi vivu plu? Tamen la malfeliĉo kaŭzita de mia okupo estas multe malpli granda ol tiu kaŭzota de repagigo de mia imposto. Se mi ne okupiĝus per tiu ĉi servo, mi de longe mizeriĝus. Jam sesdek jarojn mia familio loĝadis ĉi tie ĝis nun por tri generacioj. Tagon post tago plimalfaciliĝis la vivo de la najbaroj. Fordoninte ĉion produktitan el sia tero kaj la tutan enspezon de sia familio, ili devas formigri tien kaj tien kun larmoj kaj vekrioj. Malsataj kaj lacigitaj, ili falas teren. Ili vagas en pluvo kaj vento, varmego kaj frostoj; ili spiras miasmon, mortas kaj iliaj kadavroj kuŝas unuj sur la aliaj. Neniu el tiuj familioj, kiuj antaŭe loĝis ĉi tie samtempe kun mia avo, ankoraŭ restas nun. Malpli ol du aŭ tri el ĉiu deko da familioj, kiuj antaŭe loĝis ĉi tie samtempe kun mia patro, ankoraŭ restas nun. Malpli ol kvar aŭ kvin el ĉiu

deko da familioj, kiuj loĝis ĉi tie kun mi dek du jarojn, ankoraŭ restas nun. Ili aŭ mortis aŭ translokiĝis. Sed mi postrestas nur dank’ al serpent-kaptado. Kiam la tiranaj pedeloj alvenas al nia vilaĝo, ili ĉie bruegas kaj kaŭzas tumulton eĉ ne lasante la kokojn kaj hundojn resti en paco! Mi zorgeme leviĝas kaj rigardas al la fajenca poto. Kiam mi trovas mian serpenton ankoraŭ tie, mi rekuŝiĝas trankvile. Zorgeme mi nutras la serpenton kaj prezentas ĝin je la fiksita tempo. Post la prezento mi

revenas kaj tre bonguste manĝas kion mia tero produktas kaj tiel vivtenas min ĝis la fino de mia vivo. Mi riskas morto-danĝeron nur dufoje en ĉiu jaro kaj gaje vivas dum la resta tempo. Kiel do min trafus la malfeliĉo, kiu turmentas miajn najbarojn ĉiutage? Se mi eĉ mortus pro tio ĉi, mi mortus pli malfrue ol miaj najbaroj. Kial do mi kuraĝus opinii la servon doloriga?”

Aŭdinte tion, mi fariĝis des pli malĝoja. Konfucio diris: “Despotismo estas pli kruela ol tigro.” Antaŭe mi dubis pri tiu aserto. Nun, laŭ la kazo de tiu Giang, tio tamen pruviĝas kredinda. Ho ve! Kiu scias, ke la krueleco de la eldeviga imposto estas eĉ pli terura ol tiu de venenaj serpentoj. Do mi skribas tiun ĉi eseon, por ke tion notu tiuj, kiuj esploras pri la vivstato de la popolo.

Trad. PANDIŜO

LIU ZONGJUAN

Liu Zongjuan (773—819 p.K.) estis fame konata prozisto en Tang-dinastio. Politike li reprezentis la interesojn de la nove leviĝinta bienula klaso tiutempa kaj havis reformisman penson. Li estis forpuĉata de la reganta klico de nobeloj, burokratoj, bienuloj kaj eŭnukoj, kaj plurfoje degradigita. Dum la periodo post kiam li estis degradigita ĝis loka oficisto, li proksimiĝis al la popolamasoj kaj profunde eniĝis en la socian vivon. Vidinte la tiranecon de la lokaj oficistoj kaj la mizeron de la popolo, li persone spertis la malraciecon de feŭda aŭtokratismo. En multaj el liaj verkoj li atakis la koruptan regadon en tiutempa socio kaj montris sian simpatian al la malfeliĉa popolo.

ARTO LIGNOGRAVURA

En la antikva Ĉinio la lignogravuraĵo plejparte estis uzata kiel ilustraĵoj de libroj. Ekde la jaro 1929, dank' al zorga flegado de Lusin, fondinto de la ĉina nova literaturo, la lignogravura arto komencis viviĝi, kaj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĝi fariĝis unu el la akraj bataliloj de la popolamaso. Post la Liberiĝo, ĝi disvolviĝis en novan stadion kun temoj pli diversaj kaj stiloj pli variaj. La jenaj verkoj estas elektitaj el la novaj verkoj en la lastaj jaroj.






1 Kvieta Kamparo de Ĝang Lu

2 Ĉaso de Vu Ĵan

3 Mezaŭtuno de Hju Leng





Ĉiam Printempo

de Ĝaŭ Zongzaŭ

FOTADO

— KANTO POR LA GEINSTRUISTOJ —

LIU HOŬMING

La 27-an de julio, 1955

Posttagmeze, apenaŭ mi revenis de la antaŭurbo al la redakcio, la sekciestro Huangĉjo tuj diris al mi iri al la zoologia ĝardeno por foti la nove alvenintan malgrandan ĉimpanzon. La foto devos aperi en la morgaŭa ĵurnalo, vere urĝa tasko!

Rapideme suririnte aŭtobuson mi trovis, ke en la fotilo restas nur unu neuzita filmopeco. Ne grave. Se mi estos singardema dum la fotado, ĉu mi devas timi malsukceson?

Kiu atendis, ke subitaĵo tamen sin altrudos.

La lernejoj estis en somera libertempo kaj la zoologia ĝardeno fariĝis simple regno de la geknaboj. Kvazaŭ aro post aro da malgrandaj pigoj, ili kuradis tien kaj tien bruegante.

Tuj kiam mi eniris la pordon de la ĝardeno, jam fikse "gluiĝis" al mi iu knabo. Li estis ĉirkaŭ dekdujara en ruĝa veŝto kaj blua pantaloneto. Ĉe lia talio pendis la zonfinaĵo. Lia korpo estis plena je tero. La senordaj mallonge tonditaj haroj konturis lian blankan rondan vizaĝeton, kio pensigis al mi la figuron de leontodo. Kvazaŭ noktopapilio al lamplumo, li ĉirkaŭiris ĉirkaŭ mi, etendante la kolon por rigardi mian magnezian lampon.

Kontraŭ tiaj uloj mi ne povis ne esti iom singardema.

Jen, la knabo en ruĝa veŝto efektive ekagis kontraŭ mia magnezia lampo: Li intencis tuŝi la brilan lamposirmilon. "Kion vi volas fari?" mi demandis malbonhumore. "Oĉjo," li diris sen ia ajn ĝeno, "ŝaltu tion ĉi ke mi vidu, kiel ĝi brilas, ĉu bone?" "Ne," mi respondis flegme. Versajne li tute ne atentis mian parolmanieron kaj ankoraŭ daŭre alparolis min ride-tante: "Oĉjo, kiel la lampo nomiĝas? Ĉu ĝi brilas eksterordinare?" Mi intence prisilentis kaj forlasis lin senresponde.

Trovinte la feran kaĝon en kiu estis ekspoziciata la malgranda ĉimpanzo, mi sukcesis min trapuŝi ĝis la antaŭa vico nur tre malfacile. Ha! Kia bonŝanco! La malgranda ĉimpanzo estis manĝanta! Ĝi sidis ĉe tablo kaj estis bonguste trinkanta lakton el glaso tenata per ambaŭ manoj. La laktogutoj fluis malsupren el ĝiaj

buŝanguloj kvazaŭ ĉenoj da perloj pendantaj sur la nigra harplena brusto. Kia ideala sceno tio estis!

Tamen mi ĝojis tro frue!

Mi elektis bonan pozicion, ĝustigis la diafragmon kaj kiam mi vidis ke la bildo en la reflektoro tute klariĝis, mi levis la magnezian lampon kaj la spiron retenante ekpuŝis la obturilon. Pli rapide ol mi rakontas, ĝuste je la momento kiam la obturilo eksonigis *ktak* kaj la magnezia lumo ekfulmis, la figuro de la malgranda ĉimpanzo en la reflektoro estis subite kovrita de ies vizaĝo!



"Kiu?" mi ekmuĝis kaj levis la kapon por rigardi: Tiu, kiu kontraŭvizaĝe staras sur la betona altano ekster la fera kaĝo, estas neniu alia ol la bubo en ruĝa veŝto. Manklakante kaj ĝojsaltante, li kriis en ekstazo: "Kiel brilege! Miaj okuloj preskaŭ blindiĝis! Kiel interese!" Mi tremis tutkorpe de indigno kaj kiam mi estis lin kaptonta, li ensaltis en la homamason kvazaŭ ruĝa saltfiŝeto kaj tre baldaŭ malaperis. La apuderigardantoj ridegis je mi. . . .

Plena je kolero kaj ĉagreno mi revenis al la ĵurnal-redaktejo. Vidinte min, Huangĉjo demandis: "Kial vi tiel kuregis ke vi ŝvitas tutkorpe? Ja ne brulegas nia domo!" Malbonhumora mi diris: "Mi fuŝis. Mi revenas por preni novan filmon!" Huangĉjo surpriziĝis kaj kriis: "Ho ve! Estos tro malfrue por

transdoniĝi al la presejo! Kiel vi fuŝis? Rivelu la filmon kaj vidu!”

Liaj vortoj min vekis. Dum la ducentkvindekono de sekundo eble la malgranda ĉimpanzo estis fotografita! Sed, finfine la rezulto min malesperigis: Sur la negativo troviĝas la knabo en ruĝa veŝto, kiu kun la leontoda kapo klinita eligas la langeton kaj pli-grandigas la okulojn kun mirego, kvazaŭ dirante: “Kiel brilege! Kiel interese!”

“Kiu li estas?” En la iom postrestanta sunlumo tra la fenestro, Huangĉjo rigardadis la foton kaj diris: “Verŝajne tiu ĉi ne estas la malgranda ĉimpanzo.”

Mi intencis elverŝi al li ĉiom da mia kolero kaj ĉagreno, sed antaŭ ol mi eldiris kelkajn vortojn, mia gorgo kvazaŭ ŝtopiĝis kaj acidiĝis miaj okuloj — Estis la unua fojo dum la pasintaj du jaroj ke mi ne plenumis mian devon!

“Nu, nu, ĉion mi komprenas!” min konsolis Huangĉjo. “Troviĝas ĉe mi ankoraŭ foto pri ‘marborda banejo’. Mi unue donu ĝin al la presejo.”

“Mi do refotos la malgrandan ĉimpanzon morgaŭ frumatene,” mi diris. “Iru kiam vi havos libertempon,” diris Huangĉjo, “Morgaŭ iru foti la instruiston Ju Ginlian, ĉar la Sekcio de Kulturo kaj Edukado bezonos ŝian foton postmorgaŭ.”

Mi konas Ju Ginlian. Ŝi estas popola reprezentanto de la urbo kaj eminenta instruistino de elementa lernejo. Mi nepre bone ŝin fotos.

La 28-an de julio, 1955

La hejmo de Ju Ginlian sin trovas en strateto apud la redakstejo. Kiam mi eniris la malgrandan elegantan korton*, la instruistino Ju ĉirkaŭ sesdekjara estis ion skribanta sidante sub la tegmentrando. Ŝi lerte movadis sian penikon kun ruĝa kapo kaj ĉe ŝiaj buŝ- kaj brov-anguloj ŝvebis delikata rideto. Venteto ludis kun la grizaj haroj ĉe ŝiaj tempioj kaj vidiĝis sur ŝia larĝa frunto kvietaj brilo.

Anstataŭ ŝin veki, mi facilmove ĉirkaŭiris la florpotojn de oleandroj, granatarboj kaj pasifloroj (*Passiflora caerulea*) aranĝitajn en kvadrato, kaj ŝin fotis de ŝia flanko. Kiam ŝi sin turnis al mi, la dua foto estis jam farita.

“Kiel lerte vi kaptas ŝancojn!” ŝi salutis min kvazaŭ delonga konatulo kaj petis min sidiĝi apud ŝi. Ŝi transdonis al mi antaŭe pretigitajn glason da teo kaj palmfolian ventumilon.

“Pri kio vi okupiĝas?”

“Mi korektas verkajojn de la infanoj, ilia hejma ekzerco dum la somera libertempo.”

Mi malfermis unu kajeron: La temo por la artikolo estas “Ĝoja Tago”. Inter la multaj linioj da

* korto: konstruaĵoj formantaj unu tuton kun korto en la mezo.

plume skribitaj infanstilaj kvadrataj ideografiaj viciĝas multe da ruĝaj delikate skribitaj vortoj — la respektinda instruistino korektas tre zorgeme, kun ĉiu ideografiaĵo tiel nete kaj bele skribita.

Sed, kiam mi ĵetis rigardon al la dika staplo da verko-kajeroj, mi ne povis ne kompati la maljunulinon: Por korekti tiom da “Ĝoja Tago”, ŝi devas pasigi multe da “Penplenaj Tagoj”!

“Rigardu,” diris al mi instruistino Ju kun intereso, opiniante ke ankaŭ mi interesiĝas pri tiuj verkajoj, “kiel bele tiu ĉi frazo estas skribita! ‘La papilioj flirtas inter la floroj, kvazaŭ en kaŝludo.’ Kaj ankaŭ tiu ĉi: ‘Kvazaŭ kantante, la tagoj forpasas ritme’. . . . Kiam ni estis junaj, ni ne povis skribi en tia viveca lingvo. Se ni skribis, la frazoj ĉiam estis kia ‘La tempo forpasas kvazaŭ sago kaj la suno kaj la luno iras kvazaŭ glitbobenoj’ aŭ ‘Dum nia vivo plej gravas vestado, manĝado, loĝado kaj veturado.’ Ili estis ĉiuj banalaj kaj aĝulecaj. Denove rigardu tiujn ĉi artikolojn — eble vi trovas ilin naivaj kaj simplaj, sed ili estas freŝnovaj. La naivaj kaj simplaj pensoj kaj emocioj, kiujn la nunaj infanoj esprimas, estis ne percepteblaj por mi dum la kvindek jaroj en la malnova socio. . . .”

Mi komencis senti, ke tiuj linioj da plume skribitaj infanstilaj kvadrataj ideografiaĵoj estas ne nur objektoj de ŝia korektado, sed ankaŭ fonto de ŝiaj ĝojo kaj forto.

“Kiom da jaroj vi laboris kiel instruistino de elementa lernejo?” mi demandis.

“Tridekses,” ŝi respondis. “Sed ju pli mi instruas, des pli mi sentas, ke miaj scioj estas ne sufiĉaj. Ekzemple, mi nenion scias pri via magnezia lampo. Ĉu mi povus peti vian klarigon?”

Kiel interese! Hieraŭ la knabo en ruĝa veŝto tre interesiĝis pri la magnezia lampo; hodiaŭ ankaŭ la maljuna instruistino interesiĝas pri ĝi. Kredeble tre alloga estas nia profesio.

Kun fervoro mi donis al ŝi ĝeneralan klarigon pri mia bona kunulo — la magnezia lampo.

“Tro simple!” ŝi diris. “Ĉu vi povus ĝin malmunti kaj doni lecionon per demonstrado?”

“Bone!” Disapartigante la lampon, mi demandis: “Ĉu ankaŭ vi estas fotografia amato?”

Ŝi ekridis kaj kapskuis, kvazaŭ dirante: Klarigu, ĉiel ajn mi interesiĝas.

La 4-an de aŭgusto, 1955

Forpasis la Armea Tago kun miaj intensaj laboroj. Hodiaŭ matene, mi iris al la zoologia ĝardeno por foti denove la malgrandan ĉimpanzon.

La lastan nokton pluvigis ĝis tramalsekigo de la supra tertavolo. Ĉiuj floroj kaj arboj en la zoo-

ĝardeno aspektis eksterordinare ĉarmaj. Diversaj birdoj bele koncertas, flirtante de arbo al arbo.

Mi malrapide paŝis sur la kvieta aleo. Subite mi rimarkis du nigrajn tenisŝuojn sub alta poplo. Mi estis ilin prenonta, kiam mi aŭdis ekkrion de super mia kapo:

“Ne tuŝu! Ili estas miaj!”

Ekfalis pluvogutoj sur mian kapon. Mi levis la kapon por rigardi supren: En la densa verdaĵo brilas ruĝa punkteto. Post momento du malgrandaj nudaj piedoj elŝoviĝis de la supro de la trunko. Brakumante la glatan rektan trunkon, malsupren glitis knabo kiel simio, tiel rapide ke mia koro senkonscie bategis. Kiam mi estis ankoraŭ miranta, la knabo jam glitatingis la teron.

“Ha, estas vi!” mi diris nereteneble. En mia koro mi aldonis: “Jen malamikoj renkontiĝas sur vojo mallarĝa!”

“Oĉjo, vi venas denove!” li diris ĝoje kvazaŭ renkontinte malnovan amikon.

Forviŝante la pluvogutojn de sur mia vizaĝo, mi demandis: “Kial vi surgrimpis arbon?”

“Oĉjo,” li diris montrante al la arbosupro, “tie nestas aro da birdidoj, verŝajne palumbetoj, simile al lanugaj buletoj, vere interesaj! Antaŭhieraŭ mi vidis du grandajn birdojn, verŝajne palumbojn, kiuj alportis manĝaĵon al la nesto fojon kaj refojon. Mi supozis: Tie nepre devas esti birdidoj. Pluvis lastan nokton. Kiel maltrankvila mi estis, timante ke eble malsekiĝos la birdetoj. Ĵus mi grimpis tien kaj rigardis. Ha, ili ĉiuj restas en ordo kun neniu plumo malsekigita.”

“Sed, ĉu vi scias, ke estas malpermesite surgrimpigi arbojn en parko? Tio estas tre danĝera!” Mi decidis doni al li instruon.

Kvazaŭ ne aŭdinte, li ree fikserigardis mian magnezian lampon kaj diris kun fiero: “Malgraŭ ke vi ne klarigis al mi, mi tamen jam sciis: Ĝi estas nomata magnezia lampo, en kiu estas la pulvoro nomata. nomata magnezio, jes, magnezio. Elektrizite, ĝi tuj.”

“Sufiĉe! Sufiĉe!” Lia gajeco pliigis mian koleron. “Ĉu vi ankoraŭ memoras nian unuan rekontiĝon? Kion tiam vi faris?”

“He, he!”

“Rigardu,” mi elprenis lian portreton el la poŝo de mia ĉemizo, “anstataŭ la malgrandan ĉimpanzon mi fotis vin.”

Transpreninte la foton, li tuj ekridis ke liaj okuloj fariĝis paro da novlunetoj. “Tre klare,” li diris, “donacu ĝin al mi!” dirante li jam metis la foton en la poŝon de sia pantaloneto.

Do li tute liberas de zorgo. Tio verŝis oleon al la flamoj de mia kolero. Mi gravmieniĝis kaj lin “esplordemandis”:

“Kiomjara vi estas?”

“Dek unu-kaj-duonjara.”

“Ĉu junpioniro?”

“Jes!”

Paliĝis la vizaĝo de la knabo. Senĉese li palpebrumis, kvazaŭ demandante: Kiel mi ofendis vin? Kial vi tiel koleras?

Nu, mi klarigu al vi ĉion!

“Via konduto tiutaga ja ne montriĝis deca por junpioniro!” Mia parolmaniero estis rigida kiel bastono. “Mi fotis la malgrandan ĉimpanzon ne por distro, sed por laboro! Ĉu vi scias, ke mi estas fot-jurnalisto?”

Post tio, mi emfaze sciigis al li, ke lia petolajo ruinigis nian redakcian planon kaj kaŭzis perdon al centmiloj da legantoj.

Li aŭskultis, sen vizaĝesprimo.

“Vi zorgis tro malmulte pri la gloro de la ruĝa koltuko,” finfine, mi decidis iom eksciti la bubon. “Kion vi povus fari, se mi rakontus la okazaĵon al viaj geinstruistoj kaj samklasanoj?”

Li staris gapante, kvazaŭ ŝtupo. Subite, li ekprenis la ŝuojn kaj sin turninte tuj forkuris, per la nudaj piedetoj brue frapante sur la asfaltita vojo. Iom post iom li malaperis malproksime en la aleo.

Mi pensis: Mi agis prave, ĉar li finfine ekhontis. Kredeble ankaŭ la estimata instruistino Ju Ginlian tiamaniere edukas siajn gelernantojn. Tamen ĉiam bruis en miaj oreloj la sonoj de la paro de nudaj piedetoj. Mian koron atakis ia neklarigebla maltrankvilo.

La 5-an de aŭgusto, 1955

Post kiam la foto kaj artikolo pri Ju Ginlian aperis sur la ĵurnalo, la redakcio ricevis multe da leteroj de la legantoj: armeano ĉe la fronto de la marborda defendo, ano el la terkultura brigado de la Norda Sovagejo kaj plej multe geinstruistoj de elementaj lernejoj kaj gelernantoj de instruistaj lernejoj. Ili ĉiuj varme laŭdis ŝian laboron kaj esprimis sian volontecon lerni de ŝi.

En la vespero, mi pasante vizitis Ju Ginlian, intencante sciigi al ŝi ĉion ĉi. Tiam ŝia plej juna filino (duajara lernantino en instruista kolegio) estis leganta sidante sub lamplumo en la korto. Vidinte min, ŝi buŝsignis al la ĉambro kaj diris mallaŭte:

“Hieraŭ posttagmeze, iu knabo enkuris al ni, metis ruĝan koltukon en la sinon de panjo kaj diris plorsingultante: ‘Sinjorino instruistino, mi jam ne taŭgas

por esti junpioniro, jam ne plu!" Panjo demandis al li, kio okazis, sed li ekploregis, sin turnis kaj forkuris.

"Ĵus ŝi iris al la hejmo de la knabo, sed li ne estis dome. Neniu el liaj familianoj povis doni klarigon. Laŭ mia opinio, la knabo nepre kaŭzis ian akcidenton kaj lia memestimo estis vundita."

Nu, do ne okazis grava tragedio. Multe malpeziĝis mia koro.

"Sinjorino Ju," mi salutis ŝin enirante en la ĉambron kaj unue rakontis al ŝi ĝojindaĵon, "post kiam via foto kaj la raporto pri via sperto aperis en la ĵurnalo, ili vekis fortan resonon ĉe la legantoj! Ĉiun tagon ni ricevas kelkajn leterojn, iujn de geinstruistoj, aliajn de gepatroj de lernantoj; ĉiuj ili esprimas sian deziron lerni de vi vian spiriton en la edukado de la infanoj!"

Bedaŭrinde, miaj vortoj vekis reagon kontraŭdeziran. Sinjorino Ju ridis amare, ekĝemis profunde kaj faldante la ruĝan koltukon sur la tablo en ortangulon diris malĝoje:

"Mi estas ankoraŭ tro malproksime de la efektivo de la espero de la popolo al mi."

"Ne parolu tiamaniere," mi penis ŝin konsoli. "Estas neeviteble, ke iam infanoj kaŭzas akcidenton. Eble la knabo efektive faris ion eraran kaj estas nature ke la pliaĝuloj lin riproĉis!"

"Ne, la instruistoj ne rajtas tion diri." Sinjorino Ju glatigis la ruĝan koltukon sur siaj genuoj, kvazaŭ

karesante la harojn de iu infano. Ŝi daŭrigis: "La scivolemo de tiu knabo estas tre forta. Li estas kuraĝa kaj ankaŭ lia memestimo tre forta. Samtempe, li estas petolema kaj akcident-kaŭzema. Al tiaj infanoj oni devas esti tre singardema, kvazaŭ sarkante tritikokampon. Se vi estas iom malzorgema, vi prenos tritikidon por herbaĉo kaj ĝin elsarkos."

"Prave vi diris." Miaj vortoj estis ne plu tiel laŭtaj, ĉar ŝiaj vortoj kortuŝis min. . .



Ilustraĵoj de Sa Gengŝi

Adiaŭinte ŝin, mi paŝis sur la strato, kie la vespera vento blovis susure. Miaj pensoj ondadis nereteneble.

La patrino plej amas siajn infanojn kaj la geinstruistoj estas la patrinoj de ĉiuj infanoj. Ol Ju Gintian, mi estas tro malsupera! La "instruo", kiun mi donis al la knabo en ruĝa veŝto hieraŭ, estis nur por elverŝi mian koleron. Eble tio vundis lian koron? Eble mi senintence "prenis tritikidon por herbaĉo kaj ĝin elsarkis"?

Nu, mi devas iri al la zoologia ĝardeno morgaŭ matene por lin trovi kaj trankvile interparoli kun li. Infano povas kulpi al plenaĝulo, sed plenaĝulo ne devas kulpi al infano!

La 6-an de aŭgusto, 1955

Mi ĉirkaŭiris en la zoologia ĝardeno la tutan matenon, sed vane. Sin trovis tie kelkaj knaboj en ruĝa veŝto, sed bedaŭrinde neniu estis la serĉata. Mi staris plenan horon sub la granda poplo, aŭskultante la pepadon de la birdoj. En la oreloj denove eksonis la paŝbruoj de la nudaj piedetoj.

Nun mi komprenis pli bone: Tiun tagon, la knabo kuris antaŭ mian fotilon simple por vidi, kiel brilas la magnezia lampo, sen ajna intenco difekti mian foton, ĝuste kiel li grimpis sur la grandan poplon nur por vidi, ĉu palumbidoj en la nesto estas malsekigitaj, sen ajna intenco ilin atenci.

Ho ve, eble mi efektive traktis lin maljuste.

La 17-an de decembro, 1955

Neĝis la tutan nokton. Frumatene, la tuta anaro de la Fotografia Sekcio estis mobilizita por foti la homojn, kiuj persistis ĉe siaj laboroj en la neĝblovado — la stratpurigistoj, trafikaj policianoj, kolportaj vendistoj kaj la pentristoj bildigantaj la neĝan scenon. La serio da fotoj estos publikigita en la venonta numero de la *Dimanĉa Bildopaĝo* sub la titolo *Frosta Neĝblovo, Arda Koro*.

Mi venis al stratkruciĝo kaj decidis fotografi la trafikan policanon, kiu staris sur la arĝente ornamita fono kaj direktis la veturilojn irantajn tien kaj tien. La vento ĵetis amasiĝintan neĝon sur lian tutan korpon. Kun sia nigra pelta palto brilanta kvazaŭ kiraso, li aspektis des pli brava.

Mi staris sur la trotuaro kaj trovis bonan pozicion por lin foti.

Sed foti mi ne povis. Estis ĝuste la tempo por iri al la oficejoj kaj lernejoj. La pasantoj iradis tien kaj ĉi tien antaŭ la fotilo kvazaŭ teksbobojoj. Kelkajn fojojn mi levis la fotaparaton sed estis devigita ĝin mallevi pro la haste preterpasantaj homfiguroj.

Vere senkonsile! Kiu volas halti sur la strato kun malvarmo de pli ol dudek gradoj sub nulo? Krome, pro la neĝblovado, kiu povus rimarki min la fotjournaliston?

Mi tremis tutkorpe pro la frosto kaj la manoj kaj la piedoj komencis sensentiĝi. Plej terure estis, ke la fot-aparato povos panei pro la malvarmego.

Kiam mi denove levis la fotilon, mi aŭdis homojn alproksimiĝantaj, ne, alkurantaj, al mi — al la apuda haltejo venis omnibuso kaj la homoj hastis por atingi ĝin. Mi ekĝemis kaj estis tuj mallevonta la fotilon, kiam subite aŭdiĝis klara voĉo:

“Ĉiuj haltu! Oni fotografas!”

La konfuzaj paŝbruoj abrupte ĉesis.

Mi nereteneble ĵetis dankeman rigardon apuden: Iu knabo en blua ripvelura ĵaketo portanta ruĝan koltukon ĉirkaŭ la kolo kaj peltan ĉapelon kun oreklapoj sur la kapo etendis la brakojn kaj staris kun larĝe malfermitaj gamboj, barante kvin-ses preterpasantojn unu kapon pli altajn ol si mem. Kaj li kriadis al tiuj, kiuj estis alkurantaj de malantaŭe:

“Kamaradoj, traŭro malpermesata por duonminuto!”

Ĉiuj ekridis pro lia spriteco kaj humura maniero.

Mi ektuŝiĝis en la koro: Kiel konataj estas la voĉo kaj mieno de tiu ĉi knabo! Jen, ŝajnas al mi, ke li penas min rekoni per la okuletoj senĉese palpebrumantaj.

La tempo ne permesis al mi longe mediti kaj mi rapide fotis.

La homoj preterkuregis kvazaŭ kirlovento kaj eniris la omnibuson unu post alia. Post kiam ĉiuj estis enirintaj, la knabo ekkaptis la anson kaj facilmove saltis en la veturilon. Sss —, fermiĝis la pordo de la omnibuso.

“Kiu li estas?” Mi streĉe kontrolis la konatan vizaĝon en mia memoro. Subite elŝoviĝis tra unu el la fenestroj kapo kun senordaj mallongaj haroj kvazaŭ leontodfloro kaj unu mano svinganta peltan ĉapelon kun oreklapoj:

“Ĝis revido, oĉjo fot-ĵurnalisto!”

“Estas vi!” Mi ekmemoris, ke li estas neniu alia ol la “knabo en ruĝa veŝto”, kiu dufoje havis interrilatojn kun mi en la zoologia ĝardeno. Sed antaŭ ol mia krio estis finita, la motoro de la omnibuso jam komencis zumi. Mi okulakompanis la veturilon ĝis ĝi fariĝis ruĝa punkteto kaj iom post iom malaperis en la nebulo de neĝvento.

La sunlumo elŝprucis tra nubofendoj kaj la ĉirkaŭa mondo fariĝis blindige brila. Kun ĝojo mi reiris al la ĵurnalejo kaj sentis, ke la fotilo sur la ŝultro multe pli peziĝis — en ĝi batadas la koro de junpioniro!

La 21-an de januaro, 1956

Morgaŭ mi forveturos al Kantono kaj komencos la vivon de elsendita ĵurnalisto. En la posttagmezo, post

kiam mi aĉetis bileton por la vagonaro kaj revenis al la ĵurnalejo, mi aŭdis, ke okazas en la unua kumvena ĉambro kunsido, kiun kunvokis la Sekcio de Kulturo kaj Edukado kaj kiun partoprenas ankaŭ Ju Ginlian. Mi volis iri tien por diri adiaŭon al la estimata aĝulino.

Estis ankoraŭ pli ol dudek minutoj antaŭ la komenciĝo de la kunsido, sed Ju Ginlian kaj alia juna instruistino kun harplektaĵoj jam sidis apud la kumvena tablo.

“Sinjorino Ju,” mi iris al ŝi kaj manpremis kun ŝi, “morgaŭ mi iros al Kantono por labori kiel elsendita ĵurnalisto.”

“Ĉu?” ŝi tiris kaj sidigis min. “Se vi trovos lernindan sperton de kantonaj geinstruistoj, nepre konigu ĝin al ni!”

“Certe!” mi jesis kun plezuro. “Mi jam havas profundan intereson pri edukado de infanoj!”

Tio estis vero. De post la neĝblova mateno mi ĉiam rememoras la “knabon en ruĝa veŝto”, kvazaŭ malnovan amikon. Estas strange, ke lastatempe mi trovas apartan intereson kontaktiĝi kun infanoj, precipe kun petolemaj buboj. Ĉe ili mi povas trovi la ombron de la “knabo en ruĝa veŝto”. Kiel ajn petolemaj ili estas, mi tamen kredas, ke ili fariĝos sanaj kaj fortaj en karaktero. Mi volonte ilin regalas per rakontoj kaj ilin interpacigas. Iom post iom ili ankaŭ eksatas min kaj volas min aŭskulti.

Mi parolis tiel sincere, ke Ju Ginlian multe ĝojiĝis. Ŝi demandis al mi, pro kio mi interesiĝis pri edukado de infanoj. Mi do rakontis al ŝi la du renkontiĝojn kun la knabo en la zoologia ĝardeno.

Aŭskultis Ju Ginlian eĉ sen palpebrumo. Kiam mi parolis pri tio kiel la knabo helpis min sukcese foti la trafikant policanon tiun neĝostorman matenon, ŝia vizaĝesprimo estis unue miro, kvazaŭ post aŭdo de grava novaĵo, poste ĝojo, profunda elkora ĝojo, kaj mi vidis ke la okuloj de la avino malsekiĝis.

Ju Ginlian forte min manpremis, kvazaŭ ŝi volus diri ion. Tiam envenis kelkaj aliaj geinstruistoj, kiuj venis partopreni la kunsidon. Ili ĉiuj respektoplene ŝin salutis. Kiam iu demandis ŝin pri ŝia sano, ŝi respondis sonore ridante: “Gejunuloj, ni havu konkurson! Mi estas rejuniĝanta.” Ĉiuj ekridegis.

Ĉar la kunsido estis komenciĝonta, mi stariĝis. Stariĝis ankaŭ Ju Ginlian, kiu butonumante la kolumon de mia vatita uniformo diris: “Bonege vi parolis hodiaŭ, bonege! Bonan vojaĝon!”

Ĝis hodiaŭ la gaja humoro de Ju Ginlian ankoraŭ infektas min. Instruistino Ju, efektive vi estas karne ligita kun la infanoj. Se ili faris ian eraron, vi maltrankviliĝas; se ili faris iom da progreso, vi kore sentas feliĉon. Kiel bone estus, se la “knabo en ruĝa veŝto” estus via lernanto!

(La tago duonmonaton post kiam mi revenis de
Kantono)

Matene, mi iris al Tian-anmen-placo por partopreni la Konkursan Kunvenon de Aviadilaj Modeloj de Gejunuloj en Pekino kaj foti la ĉampionojn.

Sur la placo ĉarmis la printempo kaj hele brilis la suno. Ŝvebis naivaj ridbruoj kaj kantoj de juneco.

La konkurso komenciĝis. Aro post aro da malgrandaj aviadiloj de diversaj grandecoj, koloroj kaj formoj flugis ĉielen kaj turniĝis en la varma zefiro. Sennombraj junpioniroj kun ruĝaj koltukoj kaj liceanoj rigardis kun levitaj kapoj kaj jubile saltadis. La placo fariĝis ondanta maro kun ŝaŭmanta ĝojo.

El la laŭtparolilo disaŭdiĝis de tempo al tempo la nomoj de la ĉampionoj. Mi kuradis tien kaj reen por fari fotojn, partoprenante la ĝojon de infanoj.

Alia aro da malgrandaj aviadiloj flugis ĉielen, inter kiuj unu flugis plej alte kaj stabile. Prilumate de sunbrilo, ĝiaj blankaj travideblaj flugiloj ŝajnis tiuj de libelo. Kiam ĝi rondflugis malsupren, la aliaj aviadiloj jam de longe "revenis al la bazo". Sed ĝi ankoraŭ senhaste ĉirkaŭflugis kun la kapo iom levita, jen supren jen malsupren, kun granda memkontento.

Tiam regis plena kvieto sur la placo. La temporegistristo sur la podio fikse rigardis la halt-horloĝon en sia mano. Subite disaŭdiĝis ĝojega voĉo el la laŭtparolilo:

"Gekamaradoj, la aviadilo super niaj kapoj jam atingis la tutlandan rekordon de la triagrada aviadilaj modeloj kaŭĉukrubandaj."

Sur la placo eksplodis tondra ĝojkrio. La rigardantoj trapenetris la vicon de gardantoj kvazaŭ tajdo el disfendita digo kaj kuregis al la loko, kie la aviadilo surteriĝis.

"Gekamaradoj," anoncis voĉo el la laŭtparolilo, "la farinto de tiu ĉi aviadilo estas Tian Ĉunhian, Tian Ĉunhian, lernanto en la duajara klaso de la Kvardektria Liceo. . ."

Dika hommuro ĉirkaŭis la podion. Mi ĉirkaŭiris por trovi breĉon, sed vane. Finfine mi nur povis peti homon post homo ke ili cedu lokon al mi ke mi antaŭeniĝu paŝon post paŝo.

Nun mi vidis la liceanon starantan en la centro — mi ekmiregis kaj apenaŭ kredis miajn okulojn. Li estis neniu alia ol tiu mia "knabo en ruĝa veŝto"! Malgraŭ ke li kreskis pli alta ol mi kaj liaj haroj estis aranĝitaj en disigita formo, li restis ankoraŭ tiel sagaca kaj petolema kaj havis ankoraŭ tiun paron da okuloj, kiuj fariĝas paro da novlunetoj kiam li ekridas!

Miaj okuloj estis kovritaj de larmoj. Ĉu la kreinto de la tutlanda rekordo de la triagrada aviadilaj modeloj kaŭĉukrubandaj estas efektive la bubo, kiu volis scii ĉu mia magnezia lampo estas brila, kaj la bubo, kiu surgrimpis la altan poplon por vidi ĉu la palumbidoj estas malsekigitaj de pluvo?

Oni disiris nur je la komenciĝo de la sekvinta konkurso, kaj tiam mi iris al la knabo kaj ekkriis: "Estas vi, Tian Ĉunhian!"

"Oĉjo fot-jurnalisto!" Ĉunhian ĝoje manpremis kun mi kvazaŭ plenaĝulo. Mi prenis lian manon per ambaŭ manoj. En mia koro sonadis la frazo: "Knabo, kiu tiel bone vin kreskigis?"

"Lasu min foti vin volonte!" mi diris ŝerce.

Ĉunhian ekruĝiĝis kaj honteme diris:

"Mi ankoraŭ konservas la antaŭan foton!"

Parolante li elpoŝigis ruĝan notlibreton, el kiu li elprenis foton — ĝuste tiun, kiun mi faris "por li" en la zoologia ĝardeno antaŭ kvin jaroj.

Sur la dorsflanko mi trovis kelkajn liniojn da malgrandaj ruĝaj ideografiaj skribitaj per peniko:

Ĉar vi amas la gloron de la ruĝa koltuko, vi rakontis al mi la devenon de tiu ĉi foto. De nun ĉiam zorgu pri aliaj homoj kaj estu kuraĝa en lernado.

Via instruistino.

Ju Ginlian

En la somera libertempo de 1955.

Nur je tiu momento al la plej bela kanto, kiu embriiĝis en mia koro dum la pasintaj kvar-kvin jaroj, estis donitaj la lastaj notoj.

TRAD. PANDIŜO

Proverboj

Kiom ajn altas neĝmonto, sed bari la sunon ĝi ne povas; kiom ajn dikas tertavolo, sed premmortigi semojn ĝi ne povas.

Ĉevalaĉo rajdanton dejetas kaj ulaĉo amikon perfidas.

Se rato jam morti deziras, al kato kunsporti ĝi iras.

Fiero estas parenco de nescio.

Tamburo tre bruemas, sed ĝi malplenas.

Serpento ne fariĝas rekta eĉ metite en bambutubo.

LA farado de porinfanaj filmoj en Ĉinio multe disvolviĝis dum la lastaj jaroj; sed "La Tintileto" estas la unua longa kolora rakontofilmo por infanoj, en kiu ĉefrolas marionetoj.

La filmo komenciĝas per novaj vidaĵoj de Pekino, kiuj aperas en scenoj unu post alia. Jen aŭto kun pupoteatra trupo galopas laŭ pura kaj bonorda strato. Malfeliĉe la skuadanta aŭto eljetis survoje la marioneton Tintileto, kiu estis la anoncisto de la trupo.

Kviete ĝi kuŝas apud la vojo kaj baldaŭ estas trovita de Hiaŭgia, 6-jara knabineto. Kiam ŝi rigardadas tiun interesan pupon kun levita nazo kaj grandaj oreloj, alvenas Hiaŭman, ŝia iom pliaĝa frato. Li ekskuas la kapeton de la pupo. Jen, ĝia makzelo eĉ povas moviĝi!

Subite Hiaŭgia ĝin rekonis: ĝi estas Tintileto, la programanoncisto de la pupoteatro, kies prezentadon ili ambaŭ estis spektintaj.

Hiaŭman ege ĝojas kaj volas teni la pupon kaj ludi kun ĝi por kelkaj tagoj, sed Hiaŭgia, kiu ekmemoras la vortojn de panjo, ke "oni devas resendi al la perdinto kion oni trovas survoje", decidemtion malaprobas. "Multe da amiketoj atendas tie por rigardi ĝian prezentadon," ŝi diras.

Hiaŭman petas, en la komenco, ŝian konsenton por ludi kun ĝi por du tagoj, kaj poste por unu tago, sed ŝi ĉiam firme neas. Fine li kuras en parkon kun la Tintileto en brakoj. Hiaŭgia postkuras longan tempon, tamen ŝi ne atingas lin. Ŝi povas fari nenion krom atendi lin apud la vojo.

Portante la Tintileton Hiaŭman venas en la balanc-boaton de la infanludejo en la parko, morte laca, dormema kun nebulecaj okuloj kaj baldaŭ li eniras en la regnon de sonĝo dum balancado de la boato.


Li ekvidas ke la Tintileto eketendas siajn membrojn, leviĝas kaj estas preta por forkuri. Hiaŭman insistas ke li liberigos ĝin nur post kiam tiu ĉi prezentos programerojn. Poste la Tintileto sukcesas persvadi Hiaŭman kuniri por fari viziton al la Pupluda Teatro kaj spekti ilian prezentadon. Rajdante sur magia ĉevalo ili venas al la granda ekspozhalo de la Pupluda Teatro kie li vidas multajn groteskajn marionetojn, kaj ĉi tiuj prezentas speciale por li tre varian interesan programon. Nur nun li ekpensas pri sia fratino: kiom bone estus se ŝi venus kun li. Ĉe tiu penso la pupomagiisto de la teatro tuj helpe venigis lian fratinton al la loko. Dum la prezentado kiun la gefratoj kune rigardas, Hiaŭman eniras la ŝminkejon por la geaktoroj kaj estas varme bonvenigata. Kaj li lasas sin partopreni en ilia prezentado.

Ĉe la fino kiam la Tintileto deklamas antaŭ la spektantaro novan poemon, subite aperas giganta bubo, vizaĝe simila al Hiaŭman, kiu, ignorante la protestojn de la marionetoj kaj spektantaj infanoj,

LA TINTILETO

Unu el la plej ŝatataj rakontofilmoj por infanoj

PING FAN



Hiaŭgia trovis la Tintileton kaj pensas kiel sendi ĝin al la Teatro.

forprenas la Tintileton por ie ludi kun ĝi en solo. Kun granda indigno Hiaŭman elpaŝas por savi la Tintileton. Li postkuras la bubon ĝis la ĉirkaŭurbo kie subite baras al li la vojon ruĝa murego. La bubo ĝin transpaŝas kaj plialtigas. Kun ĉagreno kaj kolero, Hiaŭman batadas la muregon plorante kaj fine vekigigas el la sonĝo.



Malfermante siajn okulojn Hiaŭman vidas, ke la Tintileto jam ne estas ĉe li, kaj ke najbara knabineto estas ludanta kun ĝi en siaj brakoj. Hiaŭman ekmemoras la sonĝon, li diras al la knabineto kiu ne volas sendi la Tintileton al la Teatro, ke oni devas tuj ĝin resendi, ĉar multaj amiketoj nun atendas por rigardi ĝian prezentadon.

Li enbusiĝas por sendi la Tintileton al la teatro, kaj li renkontas survoje Hiaŭgia kiu serĉas lin kaj Hiaŭlan kiu serĉas la Tintileton. Kun neesprimebla ĝojo ili rapidas kune al la Pupluda Teatro.

La filmo alprenis kiel ĉefan subjektmaterialon la pupludon kiu estas plej ŝatata de la infanoj. La irado de la tuta rakonto estas konforma al la psiko de la infanoj, la lingvaĵoj kaj agmanieroj konvenas al iliaj karakterizaj trajtoj, la reĝisoro donis al la intrigo riĉajn kolorojn de mito. Ekzemple la magia ĉevalo en la aero, la mirinda prezentado de diversaj marionetoj ktp. Ĉio ĉi faris la filmon varme akceptata de la rigardantoj.


Kaj en la sonĝo de Hiaŭman la bubo, kiu estas lia vizia portreto, forrabis la Tintileton por ie ludi sola kun ĝi, Hiaŭman postkuras lin en kolero kaj maltrankvilo. Tio estas la centrigita prezento de la du animstatoj de Hiaŭman deziri restigi la Tintileton por ludi sola kun ĝi en la komenco kaj propravoле sendi ĝin al la Pupluda Teatro en la fino. La hiperbola ripeto kaj malvolvo de la intrigo en la sonĝo ne nur faras la filmon pli interesa, sed ankaŭ povas pli profunde komprenigi al la etaj spektantoj la instruon de la filmo. Ĝi donas bonan lecionon al la infanoj, kaj samtempe havigas al ili senfine interesan figuron de la aminda marioneto la Tintileto.

1. La pupoteatra trupo survoje perdis sian pupon, la anoncisto — Tintileto.
2. Hiaŭman forprenis la Tintileton el la brakoj de Hiaŭgia kaj insistas pri ludo kun ĝi por unu aŭ du tagoj.
3. Hiaŭman kaj la Tintileto rajdas sur la magia ĉevalo al la Pupluda Teatro.
4. Hiaŭman rigardas al multaj groteskaj marionetoj.
5. Hiaŭman diras al la knabineto, ke oni devas tuj resendi la pupon al la Pupluda Teatro.



fakte, tre efika por turni la situacion en la ludo, se ĝi estas lerte aplikita.

Diag. 39



Vidu la fig. (1) en la Diag. 39. La tri nigraj ŝtonoj ĉirkaŭataj tri-flanke de la kontraŭa flanko, ŝajne jam sin savus el la ĉirkaŭatako per la du sinsekvaj el-saltaj nigraj ŝtonoj D16 kaj F16. Sed se la blanka flanko metos ŝtonon de "intermeto" je A, tiam

la klopodo de la nigra flanko tute fiaskos, kiel montrita en fig. (2). Kvankam la nigra flanko sukcesos forkapti ① per ④, sed kiam la blanka flanko metos ŝtonon ⑤, la tuta interna grupo tamen estos endanĝerigita. Ĝi estos forkaptita aŭ je la punkto ① (se ĝi ne okupos tiun punkton) aŭ je la punkto B (se ĝi okupos la punkton de la forkaptita ①).

La fig. (3) montras, ke per intermeto oni povas savi la ŝajne senesperan blankan grupon. La tri blankaj ŝtonoj ĉe la angulo estas en preskaŭ senespera situacio, ĉar unue ili estas tranĉitaj for de la eksteraj blankaj ŝtonoj, kaj due la ĉirkaŭantaj nigraj grupoj estas fortaj ambaŭflanke. Sed se la blanka flanko metos intermetan ŝtonon ① la progreso montros, ke ĝi povas rompi la dekstran ĉirkaŭantan grupon kaj kapti aŭ je A aŭ je B parton de la grupo.

En fig. (4) oni vidas, ke la nigra grupo estas enfermita de la kontraŭa flanko. Ĝi havas jam unu

pretan okulon je J16 kaj ankaŭ sufiĉan lokon por alia okulo ĉe la dekstra limo. Sed se la blanka faros "intermeton" ĉe ①, tiam la okulo-loko estos detruita, kaj sekve la tuta grupo estos pereigita.

6. Lerta Interligo ĉe la Limo

Interligo de du apartaj grupoj ofte revivigas ilin ambaŭ aŭ savas la nesekurigitan. Tia taktiko estas ofte aplikata ĉe la limo de la vejĉitabulo.

Diag. 40




Fig. (1) de la Diag. 40 estas la plej simpla formo de "lerta interligo". La nigra ŝtono Ĉ18 estas apartigita de la blanka grupo kaj ĝi ne povas vivi memstare ĉe la angulo. Sed la lerte metita ŝtono ① ĝin savos per interligo kun la eksteraj nigraj ŝtonoj.

En fig. (2), la kvar blankaj ŝtonoj B2, B3, B4, C2 ĉe la angulo kaj la apartigita blanka ŝtono C8 povas esti lerte interligitaj per ① je B6.

Same estas en fig. 3, la du apartaj blankaj grupoj estas lerte interligeblaj per ① je N18.

Fig. (4) estas alia ofta formo de lerta interligo. Per unu ŝtonmeto je A aŭ B, la du dislokitaj nigraj grupoj estos kunigitaj kaj la blanka flanko ne povos plu ĝin malhelpi.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

povas klare distingi la trajton, kaj la antikvan konstruan planon. Kune trovitaj estas ankaŭ iloj de ĉiutaga vivo kaj konstruaj materialoj. Proksime al ĝi troviĝas ankaŭ antikvaj minkavoj kaj feraj instrumentoj.

RARA FOSILIO DE ANTIKVAJ VERTEBRULOJ

Fosilioj de gigantaj antikvaj vertebruloj antaŭ 150-200 milionoj da jaroj estas trovitaj en Tibeto de la geologiistoj akompantaj la Montgrimpan Ekspedicion al la montpinto Ŝiŝa Pangma de Himalajo.

Laŭ unuapaŝa esploro ili povas esti novaj specioj de gigantaj reptilioj de la triasa periodo (antaŭ ĉ. 200 milionoj da jaroj) aŭ de la jurasa periodo (antaŭ ĉ. 150 milionoj da jaroj).

La trovo de tiu ĉi fosilio havas grandan valoron por studo pri antikvaj formoj de la vivajoj kaj pri la formiĝo de la Himalajamontĉeno.

SCIENCA CENTRO SUR VASTA PAŜTEJO

Nova scienca centro por esploro pri paŝtejo kaj paŝtado estas konstruata en Interna Mongolio.

Sciencistoj kaj teknikistoj pri paŝtejo, paŝtado, veterinaro, scienco, geobotaniko, kaj hidrogeologio estas irantaj ĉi-tien por komencian laboron.

La centro situas sur altebenejo mil metrojn super la marnivelo, kaj kun areo de pli ol 2,300 kvadrataj kilometroj. Ĝi finestabiĝos en dek jaroj.

PLI DA LABORISTOJ AKIRIS FAKAJN SCIOJN

Sole en Ŝanhajo, 4,000 laboristoj finis siajn universitatajn studojn en la postlaboraj universitatoj ĉijare. Tiu ĉi cifero duobligis tiun en 1963.

IMPRESOJ

de Tanganjika Ministro



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj (maldekstre) interparolas kun Swai.
Foto de Vu Huahjue

LA 3-an de dec., 1963 la Ministro de Tanganjiko por Projektado kaj Disvolvo, A. Z. N. Swai parolis al la raportisto de la Novaj-agentejo Hinhua en Daresalamo: “Dum mia lasttempa vizito al Ĉinio, plej forte impresis min la metodo laŭ kiu la tuta popolo de Ĉinio sin organizis por entrepreni konstruadon.”

Li diris: “En Ĉinio ĉiu, kiu kapablas labori, partoprenas la bone planitan konstruadon. Tio konformas al la politiko disvolvi ekonomion kaj plibonigi la popolan vivstaton sin apogante sur siaj propraj fortoj.”

Li speciale laŭdis la popolan komunumon viditan en Ĉinio:

“Kiel sistemo por rapidigi reformadon de agrikulturo, la popola komunumo estas vere laŭdinda. Ĝi prezentas, en skalo senprecedence granda en la homa historio, solvon al diversaj problemoj pri agra revolucio.”

“Ankaŭ la ĉina politiko por industriigo forte min impresis,” li diris. “La ĉina industriigo progresas laŭ la politiko preni la agrikulturon kiel la fundamenton kaj la industrion kiel la gvidantan faktoron de la nacia ekonomio.”

Li diris: “Laŭ tiu politiko Ĉinio disvolvas la pezan industrion por defendi siajn teritorian integrecon kaj suverenecon.”

“Ĉiuj tiuj agoj kaj metodoj por solvi problemojn,” li aldonis, “devenis de la deziro plibonigi la vivon de la popolo.” “Dum mia vizito al fabrikoj, vilaĝoj, hospitaloj, oficejoj, hoteloj aŭ iu ajn alia loko, mi vidis ke ĉiu energie laboras kaj laboras gaje. Ĉiuj infanoj estas sanaj kaj feliĉaj.” Li akcentis: “Unuvorte, en Ĉinio neniam antaŭe tiel multaj homoj vivis tiel bone.”

“La ĉina popolo faras firman batalon kontraŭ imperiismo kaj diversformaj koloniismoj en diversaj lokoj de la mondo.” Li diris: “Ĝi faras tian batalon pro tio ke en la pasinteco ankaŭ ĝi suferis de imperiismo kaj koloniismo.”

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Nun en Ŝanhajo troviĝas 85 postlaboraj altaj lernejoj. Ili havas pli ol 40 profesiajn fakojn kaj pli ol 20 ĝeneralajn fakultatojn. Multaj laboristoj finintaj la studon altigis sian kapablon kaj pli multe kontribuas en siaj laboroj.

LA UNUJ LERNANTOJ EN MONTVALOJ DE HIMALAJO

En la montvaloj dissemataj en pli ol 2000 km. laŭlonge de Himalaja-montĉeno ekestis pli ol 100 elementaj lernejoj. Ili estas la unuaj en tiu loko al kiu ege mankis komunikaj rimedoj. Nun proksimume duono de la lernej-

aĝaj geknaboj frekventas lernejojn kaj miloj da tibetaj kamparanoj povas sin klerigi en la vesperaj kursoj.

RAPIDE KRESKA ANASO

Pekina anaso estas konata pro ĝia grasa viando kaj rapida kresko. Ordinare nur 60 tagoj estas bezonataj por ĝia plenkreskiĝo taŭga por kuro. Sed tiu tempo estas plie mallongigita ĝis 55 tagoj laŭ eksperimentado de la bredejoj kaj la Instituto de la Sciencoj de Bestbredado kaj Bestkurado. En tiu tempo la anasoj povas kreski ĝis 2.74 kilogramoj.

TIBETA RIBELINTO REHEJMIGIS

En aprilo ĉijare Phuneoh Vangdue, tibeta ribelinto antaŭ kvin jaroj, revenis al Lhasa el eksterlando. Li estis bonvenigita en amasa kunveno de Lhasa kaj rehejmigita al lia naskiĝa loko. La registaro donis al li 140 kilogramojn da grenoj, unu laktobovino, ok ŝafojn kaj tutan kompletan da agrikulturilojn por ke li povu partopreni la agrikulturan produktadon. Antaŭ reiro al sia hejmo, li ankaŭ vizitis la urbojn Ŝekaze, Ĉjelci k. a., kaj ĉie li vidis multe pli bonan vivon ol antaŭe, kiam li forlasis Tibeton.



La ĉina specialisto Tang Jaŭzu (la kvara demaldekstre) kaj teknikistoj de Malio pristudas sukerkanojn surkampe.

Ke Malio Havu Sian Sukeron

FANG ĜAŬ

EN la Ekspozicio pri Ĉinaj Ekonomiaj Atingoj okazigita ĉe la fino de 1963 en Bamako, estis montrataj kelkaj verdaj tearboj kaj sukerkanoj 3 metrojn altaj. Ili tre interesis la malian publikon. La kaŭzo estas, ke ili estas plantoj sukcese kulturitaj de Malio mem helpe de ĉinaj specialistoj.

Doloraj Rememoroj pri Sukero

Teo kaj sukero estas ĉiutagaj vivbezonoj de la malia popolo. Sed antaŭ ĝia sendependiĝo, teo kaj sukero, precipe sukero, estis tute importitaj kaj tio estis utiligita de la koloniistoj kiel unu el la rimedoj por kontroli la ekonomion de Malio.

Por daŭrigi tian kontrolon, "specialistoj" de la koloniistoj eĉ trompis la malian popolon per falsaj eksperimentoj kaj esplorado kaj asertis ke Malio ne konvenas por kreskigi sukerkanon.

Nun, la malia popolo sukcesis mem kulturigi tearbojn kaj sukerkanojn! Tio malfermis al la malia popolo vojon de memprovizado per teo kaj sukero.

Malio Jam Havas Sian Sukerkanon

Ĉiuj, kiuj vizitas Malion, estas profunde impresitaj per la riĉeco kaj beleco de la lando. La regiono laŭlonge de la bordoj de Niger-rivero estas precipe fekunda kaj por agrikulturo kaj por paŝtado. La eksperimenta sukerkankampo kune kulturata de ĉinaj specialistoj kaj maliaj laborantoj situas en la plej granda kulturejo en la meza parto de Niger-rivero — la 'Nigera Oficejo'.

K-do Tang Jaŭzu, ĉina specialisto, venis en Malion en 1962 kun la komisionoj de la popolo de sia patrolando. Post sia alveno, li faris profundajn esploron kaj studadon piedirante de loko al loko spite al baroj kaj penigoj, kaj fine decidis prove kulturigi sukerkanojn en Nioro-produktodistrikto de la Nigera Oficejo. Kune kun la maliaj laborantoj, unue li faris eksperimentojn sur malgrandaj terpecoj. K-do Tang Jaŭzu, kiu estas jam pli ol 60-jara, laboras surkampe de frua mateno ĝis vespero, studante kaj prizorgante la sukerkanajn plantidojn. Eĉ tiam, kiam la temperaturo atingis pli ol 40°C. en seka sezono, li ankoraŭ laboris en la kampo kune kun maliaj popolanoj kun ŝvito kaj fervoro kulturante la unuajn sukerkanarojn en la malia historio.

La mensogoj de la koloniistoj bankrotis, kaj la plago de termitoj damaĝantaj sukerkanojn estis venkita. La sukerkanoj plantitaj en majo 1963 kreskis ĝis trimetra longeco kaj ili kreskis 70 centimetrojn en aŭgusto sola. La ĉina specialisto lerte utiligis sukerkanajn branĉojn por plimultigado, kaj dank' al tio nur en iom pli ol unu jaro oni jam sukcesis reprodukti el la unuaj dek kelkaj sukerkanoj sukerkanaron sur areo de 17 hektaroj.

La bona novaĵo pri sukcesa provplantado de sukerkanoj tuj disportigis tra la tuta lando, kaj eĉ kamparanoj en la plej malproksima montregiono informigis ke Malio trovis la vojon por provizi al si

mem sukeron, tiel necesan en la vivo. Pro tio, vilaĝanoj irantaj al foiro, preterpasantaj vojaĝantoj, oficiroj alvenintaj por kunveno, ministroj de la registaro — ili ĉiuj vizitis la sukerkanajn kampojn. Kelkaj kamparanoj eĉ petis sukerkanajn plantidojn kaj klarigon pri la planta metodo por mem kulturi sukerkanojn en sia hejmloko. Prezidanto Modibo Keita foje akompanis gaston el fremda lando viziti la sukerkankampon kaj esprimis kontenton pri la laboro. Kaj tiu gasto diris, ke ĝi estis la plej bona el la sukerkankampoj de li viditaj en Afriko.

Nova Simbolo de Amikeco

K-do Tang Jaŭzu tre admiras la laboremon, bravecon kaj senartifikecon de la malia popolo kaj li laboras kaj vivas kune kun ĝiaj popolanoj. Por konkeri malfacilaĵojn en lingvo, li diligente studis dum sia libertempo la bambaran lingvon de la popolo. Nun, li jam povas doni prelegojn al la junuloj sen

interpretista helpo kaj iom babili kun loĝantoj en la regiono. La maliaj popolanoj trovas ke la ĉina specialisto estas simpatia kaj respektema al la afrika popolo.

Kaj la maliaj registaro kaj popolo prizorgas la ĉinajn specialistojn ĉiam kaj ĉiamaniere. Kiam ministroj kaj ŝtatoficistoj de ĉiuj rangoj inspektas laboron, ili kutime vizitas la ĉinajn specialistojn. La malia popolo sendis ĉiujare la plej fruan rikoltajon de mangoj kaj bananoj al la ĉinaj specialistoj. En februaro 1963, kiam la popolo festis sian ĉesigon de fastado, aro de infanoj de la urbo Nioro venis kun maskoj kaj tamburetoj kaj salutis k-don Tang Jaŭzu k.a. per kantoj kaj dancoj.

Nun la malia registaro aktive agadas por pligrandigi la areon de sukerkankampoj en Malio, en ĉi-tiu jaro ĝi plivastiĝos ĝis 90 hektaroj. La sukerkanaroj de Malio certe ĉiam pli prosperiĝos same kiel la amikeco inter la ĉina kaj malia popoloj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

KAMPARAJ KLUBOJ

En Ĉinio nun troviĝas dekoj da miloj da kamparaj kluboj kaj junularaj centroj por distriĝo kaj edukado de la kamparanoj.

Estas organizitaj de ili amatoraj teatraj, muzikaj kaj sportaj grupoj. En ĝiaj biblioteketoj kaj leg-ĉambroj oni trovas oportunon por studi teknikajn kaj politikajn verkojn.

Specialaj grupoj de la kluboj ankaŭ eldonas murgazeton, aranĝas rakont-vesperojn kaj ekspoziciojn. Ankaŭ postlaboraj teknikaj kursoj estas funkciataj.

Dum festoj la amatoraj grupoj faris prezentadon por la komunumanoj. La kamparanoj ofte verkas kaj ludas mem teatraĵojn pri sia hodiaŭa vivo kaj siaj estintaj bataloj.

NOVA INTERNACIA AERODROMO EN ŜANHAJO

La aerodromo en Ŝanhajo estas larĝigita kaj rekonstruita por internaciaj servoj. Ĝi nun fariĝas internacia aerostacio uzebla por ĉiaj veteroj. La aerodromo kapablas akcepti kaj servi ĉiutipajn pasaĝerajn aerplanojn en ĉiu horo. La starta kurejo estas larĝigita kaj fortikita. Pliaj remizoj por aeroplanoj kaj kontrolaj ekipaĵoj estas

aldonitaj. Ankaŭ pli grandaj instalajoj por provizado de elektropovo kaj aeroplanaj brulaĵoj estas aldonitaj al ĝi.

PREMIOJ POR SCIENCAJ KAJ EDUKAJ FILMOJ

35 scienca-edukaj filmoj estis premiitaj en Pekino en lasta aprilo. Ili estas elektitaj el 315 samspecaj filmoj per popolamasa voĉdonado. Ĉiu el ili temas pri agrikulturo. La premiitaj estis filmoj, film-produktintoj kaj sciencistoj, kiuj helpis la produktadojn kiel konsilantoj.

PLI OL 200 SANATORIOJ POR LABORISTOJ

Nun en Ĉinio troviĝas jam pli ol 200 sanatorioj, refreŝigejoj bone provizitaj por laboristoj en la tuta lando. Ili ĉiuj situas en famaj lokoj kun belaj pejzaĝoj. Sume estas pli ol 40,000 litoj en la sanatorioj, kaj sufiĉas por senpage akcepti ĉiujare 200,000 laboristojn malsanajn aŭ resaniĝantajn kaj kelkajn dekmilojn da ripozantoj por refreŝiĝo. Krome troviĝas ankoraŭ proksimume 40,000 litoj en pli ol 1,000 sanigejoj funkciigitaj de lokaj fabrikoj kaj minejoj. Maljunaj laboristoj ĝuantaj bonajn zorgojn en tiuj lokoj ofte ne povas

sin deteni de rememoro pri la suferoj de la laboristoj antaŭ la Liberiĝo.

TUTLANDA KUNVENO PRI SANGAJ MALSANOJ

En la lasta aprilo okazis en Tiangino de Hebej-provinco Tutlanda Kunveno pri Sangaj Malsanoj. La rapida progreso de ĉinaj medicinaj studoj en tiu ĉi kampo estas revuita en tiu ĉi kunveno.

Partoprenis 170 specialistoj pri sangaj malsanoj. 442 fakaj traktatoj estas kolektitaj.

ISLAMA KORBAN-FESTO EN PEKINO

La 23-a de aprilo estas la Korban-festo de islamanoj. En tiu tago la islamanoj en Pekino kaj aliaj urboj de Ĉinio ĝoje celebris sian tradician feston. En Pekino religiaj servoj de islamanoj okazis en la grandaj malnovaj moskeoj. Ilin partoprenis, krom pekinaj islamanoj, ankaŭ samreligiuloj el Malio, Pakistano, Afganio, Gvineo, Maroko, Zanzibaro, la Unuiĝinta Araba Respubliko kaj Somalio. La Ĉina Islama Asocio aranĝis en tiu tago specialan akcepton por ĉinaj islamaj gvidantoj en Pekino kaj islamanoj el aliaj aziaj kaj afrikaj landoj.



Vortoj signitaj per “*” estas klarigitaj en “Nia Vortareto”

Letero al Malproksimaj Amikoj (II) Ĉinoj

Karaj geamikoj,

Verŝajne ankaŭ Vi kiel multaj aliaj nomas niajn landanojn ĉinoj. Ja en nia internacia lingvo estas tiel difinite. Sed ĉu vi iam imagis, karaj geamikoj, ke sub la nomo ĉinoj troviĝas multaj nacioj? Ĉinio ja estas multa-nacia lando.

El la 650,000,000 ĉinaj popoloj, 600,000,000 apartenas al han-nacio, kaj la ceteraj al pli ol kvindek aliaj nacioj. Pri tio oni jam parolis en la artikoleto “Naciaj Malplimulto de Ĉinio” sur p. 90, n-ro 3, EPĈ, 1958. Ĉu vi ĝin legis?

Ĉar han-nacio estas la plej granda nacio en Ĉinio, tial ĝi ludis kaj ludas gravan rolon en la historio kaj en la socialisma konstruado de Ĉinio, kaj ĝi estas nomata de la malpli grandaj nacioj la “aĝa frato”.

Tamen ne malpli gravaj estas tiuj malpli grandaj nacioj en la ĉina granda familio. El ili la mongoloj kaj la tibetanoj estas la plej multe konataj eksterlande. Krom ili troviĝas en Ĉinio 8 aliaj nacioj kun po pli ol miliono da anoj, 16 kun po pli ol centmil anoj, kaj 15 kun po pli ol dekmil anoj. La ceteraj nombras nur po kelkaj miloj.

La diversaj nacioj en Ĉinio kelkloke estas mikse loĝantaj kaj kelkloke loĝas aparte en siaj propraj regionoj. Ili dislokiĝas en la tuta lando kaj precipe en la nord-okcidento, sudokcidento kaj la nordoriento.

Nun ĉiuj nacioj de Ĉinio estas egalrajtaj kiel skribite en la fundamenta leĝaro de la ŝtato. Subpremo kaj maljusta distingo estas malpermesitaj; ĉiuj nacioj rajtas uzi sian propran lingvon, konservi aŭ reformi siajn kutimojn; kaj en lokoj loĝataj plejparte de unu sama nacio, nacia aŭtonomio estas praktikata. Ĝis nun fondiĝis en la tuta lando jam kvin aŭtonomaj regionoj (provinco-nivelaj, unu el ili estas en prepara etapo), 29 aŭtonomaj subprovincoj kaj 63 aŭtonomaj gubernioj, t. e. pli ol 90% de la malpli grandaj nacioj ĝuas plenan aŭtonomion.

Kiaj estas tiuj ĉinoj? Pri tio oni faris kaj faras multajn misprezentojn eksterlande.

En la okuloj de la imperiistoj, kiuj ekspluatis nian landon, la ĉinoj estas stultaj, malpuraj, malkleraj, sklavemaj kaj devas esti regataj aŭ “civilizitaj” de ili. Tiajn figurojn oni povas vidi en la salono de vaksfiguroj en Londono, en la verkoj de Pearl S. Buck k. s. kaj eĉ en la verkoj de usonaj lakeoj kia Lin Yu Tang. Lasttempe iuj fabrikas ankaŭ novan mensogon pri Ĉinio, ke la ĉinoj estas militemaj.

Karaj geamikoj, kompreneble, ĉion ĉi tion vi ne kredas. Vi ja vidis en nia gazeto ke ĉinoj estas pacamaj kaj konstruemaj. Ĉiuj en nia lando nun penas ĉiamaniere konstrui socialismon, t. e. la feliĉon por la tuta laboranta popolo. Kompreneble por tio ni multe faris por forigi la malhelpojn sur la vojo, kiaj la imperiisma subpremado, la feŭda kaj koloniisma jugo, kaj nun multe faras por defendi la pacon kiu garantias la socialisman konstruadon.

Nia popolo multe suferis en la lasta jarcento. Tial ni, ĉinoj ĉiam simpatias al la popoloj ankoraŭ subpremataj kaj ekspluatataj. Efektiviĝis jam enlande la egaleco inter la nacioj. Ĉu tio ne devas realiĝi ankaŭ internacie? Ankaŭ mi kiel esperantisto, tion arde aprobas.

ANEKDOTO

Piedbato al Azeno

Ĝeng Bankiaŭ (1693—1765 p. K.) estis fama pentristo kaj poeto. Antaŭ ol li fariĝis fame konata, li loĝis ĉe iu parenco en Jangĝou de Ĝiangsu-provinco. Dum legado kaj pentrado, li estis ofte ĝenata de infanoj. Li do iris ĉiutage kun libroj al la domo Mingluntang (tiam ŝtata loka lernejo) por daŭrigi sian studon.

La instruisto de la lernejo estis dign-aspekta* maljunulo, kun kelkaj mus-lip-haroj, kaj sur lia nazo sidis grandaj okul-vitroj. Pri humaneco kaj justeco li ofte parolis hipokrite*. Tion Ĝeng Bankiaŭ tre abomenis. Al li malplaĉis precipe tio, ke oni devis saluti la instruiston ĉe renkontiĝo per profunda riverenco, dum tiu ĉi estis tre flatema al la riĉaj kaj potencaj. Salutate de la lernantoj el riĉaj familioj li ridis al ili afable, sed al la salutoj de malriĉaj lernantoj, kia Ĝeng Bankiaŭ, li respondis mal-modeste kun levita kapo nur per sola “hm”. Pro tio Ĝeng Bankiaŭ tre indignis. Kaj li ekdeziris iel lin puni.

La instruisto ĉiutage venis al la lernejo rajdante sur azeno. Atinginte la lernejon, li ligis ĝin al arbo ekster la pordo. Iutage, preterpasante la azenon Ĝeng Bankiaŭ subite kaptis ruzan ideon. Unue, li faris riverencon kontraŭvizage al la azeno, kaj tuj poste li donis fortan pied-baton al ĝia postajo tiel ke ĝi eksaltegis pro doloro. Ekde tiam, ĉiutage li ripetis la samon. Post iom da tagoj, se nur li riverencis al la azeno, ĝi tuj eksaltegis antaŭ ol esti piedbatata.

En iu varmega post-pluva mateno, la instruisto en hel-blua silk-robo* kaj nigra mallonga super-vesto, kun paro da nove aĉetitaj ŝuoj sur la piedoj, bonhumore venis rajdante sur la

azeno al la lernejo. Tiam renkonte al li venis Ĝeng Bankiaŭ, kaj faris respekto-plenan riverencon antaŭ la azeno. La azeno tuj eksaltegis kiel kutime kaj dejetis la hipokritan majstron sur la



Ilustrita de Luo Eršeng

kotan* vojon, antaŭ ol ĉi tiu eldiris "hm". Vidinte tion, Ĝeng Bankiaŭ pene sin-de-tenis de rido kaj ŝajnis sin ege konsternita. Li kliniĝis kaj helpe starigis la majstron, kies vizaĝo fariĝis jen blua jen pala pro la falo kaj la vestoj tute malpuriĝis de koto, kaj krome, dis-rompiĝis unu el liaj okulvitroj. La instruisto, kvankam senlima kolero bolis en lia koro, tamen povis diri nenion kaj malĝoje for-iris kondukante la azenon.

La samo ripetiĝis kelkfoje kaj la instruisto estis ege ĝenata, sed li povis neniel sin defendi, kaj li devis kontraŭvole piediri ĉiutage kondukante la azenon. Kvankam li supozis ke tio kaŭziĝis de Ĝeng Bankiaŭ, sed li neniel povis malkaŝi lian ruzon. Nur post kiam oni malkaŝis al li la veron, li ek-

komprenis ĉion. Por eviti la ĝenadon, li permesis ke Ĝeng Bankiaŭ ne riverencu al li ĉe renkontiĝo kaj disponigis al li puran legĉambron.

De-post tiam li ne plu kuraĝis malmodeste konduki al la malriĉaj lernantoj kiel antaŭe.

Rakontoj Pri Afanti

"Prenu la 'Nenion'!"

Iu iris sur la vojo portante surdorse grandan faskon* da bruligno. Subite rompiĝis la ŝnuro de la fasko kaj la ligno-pecoj disfalis sur la teron. Por re-paki la faskon li petis helpon de preterpasanto. Kiam ĉio estis bone aranĝita li denove sur-dors-igis la faskon kaj diris "dankon" al la helpinto.

"Ĉu vi min dankas? Sed per kio?" demandis la helpinto.

"Mi. . . mi. . . ja havas nenion."

"Nenion?!"

"Jes, ja! Pardonon!"

"Nu, donu, do, al mi la 'nenion'!"

"Kio?"

"Tuj donu al mi la 'nenion'!"

Venis tiam aliaj vojaĝantoj. Sed neniu el ili povis solvi tiun strangan malpacon. Iu proponis, ke ili vizitu Afanti-n.

Sciiginte pri la afero, Afanti subite salte leviĝis de sia sidkuseno* kvazaŭ li estus pikita de insekto.

"Ho ve! Bonvolu rigardi kio estas sub mia sidkuseno!" diris Afanti al la postulanto de dankajoj levinte la kusenon.

"Estas nenio," diris la lasta post atenta esploro.

"Nu, tuj prenu la 'nenion'!" diris Afanti.



Ilustrita de Li Juhong

Spirita Konsolo

Iutage Afanti perdis sian azenon*.

Li anoncis publike: "Kiu retrovos la perditan azenon por mi, mi donacos al li kaj la azenon kaj la selon*."

"Kio estas la diferenco por vi perdi la azenon kaj fordonaci ĝin?" iu demandis.

"Kio?" mire kontraŭ-demandis Afanti. "Ĉu vi opinias, ke la spirita konsolo havas nenian valoron?"

Domo de Granda Sinjoro kaj Muelejo

Foje Afanti vizitis urbon. Neatendite li vidis grandan novan domon antaŭ li. Tio estis domo de iu granda sinjoro.

Kiam Afanti estis tie rigardanta, venis malafablaj gardistoj rondirantaj ĉirkaŭ la domo. Ili kriegis al Afanti:

"For, mizerulo! Kion vi rigardaĉas ĉi-tie?"

"Longe mi rigardadis; tamen mi ankoraŭ ne scias, kion oni faras ĉi-tie. . . ." respondis Afanti.

“Ĉi-tie estas muelejo por faruno*,” lin trompis la gardistoj, vidante ke li aspektas malsaĝa kaj portas vestojn el-uzitajn.

“Nu,” diris tuj Afanti, “kompreneble tiuj, kiuj ĉi-tie rond-iras senĉese estas grandaj bestoj.”



Ilustrita de Li Juhong

NIA VORTARETO

Azeno — Dom-besto simila al ĉevalo, sed malpli granda kaj kun pli longaj oreloj.

Digno — Nobleco elvokanta respekton.

Faruno — Muelajo el grenoj.

Fasko — Pli-malpli orda kunligita-ajo de longformaj objektoj.

Hipokriti — Ŝajnigi sin virta, nobla.

Koto — Tero, polvo miksitaj kun malpura akvo sur la strato.

Kuseno — Sako kun molaj aĵoj sur kiu oni povas sidi aŭ kuŝi komforte.

Riverenco — Saluto per sinklino.

Robo — Longa vesto kovranta la korpon de la kolo ĝis la piedoj.

Selo — Sidilo sur ĉevalo aŭ similaj rajd-bestoj.

Silko — Materialo por fari brilan belan veston.



PLIA ALTA LERNEJO DE ĈINIO EKINSTRUAS ESPERANTON

Ekde aprilo ĉijara en la Orient-ĉinia Instruista Universitato en Ŝanhajo, Esperanto estas instruata oficiale al 20 studentoj de la fremdlingva fakultato kiel la dua fremdlingvo. La instruado daŭros du lernojarojn.

ESPERANTA EKSPOZICIO EN IZRAELO

En lasta marto okazis en la klubo TARBUS (kulturo) en Petah

Fikva de Izraelo. Ĝi estis aranĝita de s-ano Ben Alter Jehiel.

La ekspozicio estis titolita “Esperanto en la Servo de Popola Ĉinio”. Ekspoziciitaj estis ricevitaĵoj numeroj de nia gazeto, ĉiuj esperantaj libroj kaj albumoj, kalendaroj, bildoj de ĉinaj pentristoj kaj paper-eltranĉaĵoj.

La ekspozicio akiris grandan sukceson, kaj ĝi daŭris unu semajnon anstataŭ du tagoj kiel antaŭe planitaj.



Esperanto Bone Flegata en Bulgario

Dum la lernojaro 1963/1964 Esperanto eniris la lernejojn kiel fakultativa lernobjekto en Bulgario. Multaj gelernantoj en mezlernejoj, teknikaj lernejoj lernas la internacian lingvon.

Rimarkinda evento ja proklamas la aktualecon de Esperanto ankaŭ en elementaj popollernejoj.

Bonan klimaton ĝuadas la esperantistaro pro grandega intereso de la juna generacio, la 10-12-jaraĝuloj, lernantaj en triaj kaj kvaraj klasoj de popollernejoj, la morgaŭaj fortoj de nia sankta afero.

Bonegan kontribuon faris tiurilate la internacia 48-a U. K. kaj

8-a infankongreseto pasintjare en Sofio.

Fakte estas malfermitaj centoj da E-kursoj tra la lando. Notinde en Ruse funkcias 23 esp-kursoj. Ni devas noti la kreon de Esperanto-klasoj en elementaj popollernejoj, kie geetuloj entuziasme kaj aktive lernas Esperanton, flegataj de bonaj, spertaj infanlektoroj. Citindaj E-klasoj en Ruse, Trojan, Bjala, Velingrad k. a., dank’ al progresemaj apogoplenaj konsciaj profesiaj instruistoj, kiuj agnoskas Esperanton kiel aktualan instrumenton por kontaktiĝo kun la tutmonda geknabaro.

Modela laboro por interkompreniĝo inter la popoloj kaj efika propagando pri praktiko de Esperanto.

ESPERANTO EN LA POLITEKNIKO DE POLLANDO

Dank' al klopodoj de la Studenta Esperanto-Rondo ĉe la VROCLAVA POLITEKNIKO, de la politeknikaj instancoj kaj ankaŭ de la Politeknika Konsilantaro de la Unuiĝo de Polaj Studentoj estas ĉi tie organizita kaj starigita katedro de Internacia Lingvo Esperanto. La unuaj lekcionoj okazis la 6-an de marto de la kuranta jaro. Ili estas gvidataj regule unufoje en ĉiu semajno de mag. Krzysztof Migoń (scienca laboristo) el Vroclava Universitato.

LAŬ JAN ŜMYKALSKI

TENDARO POR JUNULARO EN GERMANIO (OKC.)

Germana Societo por Internacia Junular-interŝanĝo organizos kiel en 1963 E-kursojn en siaj tendaroj en Niederbreisig kaj Nigra Arbaro, inter la 20-a de junio kaj la 12-a de septembro. Partoprenos gejunuloj el 8 eŭropaj landoj. Ĉiu partoprenonto ĉiam restos nur po 14 tagoj. La E-kursoj daŭros en ambaŭ tendaroj dum la tuta tendumado. Interesiĝantoj petu informon de "Deutsche Gesellschaft für internationalen Jugendaustausch", 53 Bonn, Viktoriastr. 24-26.

INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO

Estis fondita en oktobro, 1963 Instituto por Esperanto en Komer-

co kaj Industrio (EKI). Ĝi kunlaboras kun UEA.

Ĝi intencas kompili poliglotan fakterminaron pri komerco kaj industrio kaj verki lernolibron pri tiu fako. Kaj tiu laboro jam komenciĝis. Nun ĝi apelas, ke esperantistoj interesiĝantaj pri enkonduko de Esperanto en tiun fakon ne verku aŭ eldonu ion similan sen antaŭsciigo al ĝi. Se iu volas interligiĝi kun ĝi, skribu al tiu instituto (adr: Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando).

NEKROLOGO

Laŭinforme forpasis s-ano Kav. Giuseppe ZACCONI, prez. de la Bologna Esp-grupo "Achille Tellini", je la 16-a de marto, 1964.



Estas salutinda la boncela starigo de E-klaso en Ruse la lernejestrino k-dino Penka Baltaĝieva kiu kunlabore kun la lerneja konsilantaro kaj gepatra komitato kontribuis firmdecide la instruadon de Esp-o ekde 22-XII-1963 fakultative kun lektoro Dimitr Ivanov, sperta gvidanto de kursoj ekde 1928.

La geknaboj strebadas bonan lernadon, deklamadon kaj kantanadon en Esp-o. Ili serĉas samaĝajn gekorespondantojn. Skribu al: Dimitr Ivanov, Ruse, Varodar 3 (Bulgario) interŝanĝe bildkartojn, fotojn k. a. kun tutmondo.

LERNEJESTRINO:
BALTAĜIEVA,
DIMIRUSE



Forpasis Prof. D-ro Hideo Yagi

La sesan de majo, 1964 mortis elstara medicinisto kaj laborinto por la Internacia Lingvo, Profesoro D-ro Hideo Yagi en sia 65-jara aĝo. Li atingis grandan eminentecon en la fakoj de ginekologio kaj akusa scienco, kaj krome prezidis dum la pasintaj du jaroj la Universalan Esperanto-Asociacion.

Ni esprimas nian profundan funebbron al lia morto kaj sinceran kondolencon al niaj japanaj samideanoj kaj liaj familianoj.

ĈINA ESPERANTO-LIGO
REDAKCIO DE EPĈ.



ESPERANTA LIBROBRETO

INTERNACIA ELEKTROTEKNIKA VORTARO grupoj 05 kaj 10—Pola-esperanta kaj esperanta-pola. Multobligita eldono de la Pola Esperanto-Asocio. Prezoj: zl. 13 (por grupo 05) kaj zl. 12 (por grupo 10).

Aplikado de Esperanto en la socia batalo kaj la scienca esplorado estas du interligitaj vivnecesaj vojoj por ĝiaj evoluo kaj vera enradikiĝo en la homa socia vivo. Tial esperantaj literaturoj en tiuj du fakoj havas pli gravan signifon ol tiuj nur por distro de iaĵ amatoroj. La eldoniĝo de tiuj du grupoj de la Internacia Elektroteknika Vortaro do estas dezirinda. Ni esperas, ke ankaŭ la ceteraj grupoj de la

vortaro aperos en Esperanto. Se eble, pli bone kun esperantaj difinoj.

Tadeusz Wójcik kaj Maciej Zalewski: **PRINCIPOJ DE LA RACIA MUZIKSKRIBO**—N-ro 17 de Biblioteko-Izomorfo. Trad. de Bolesław Monkiewicz. Multobligita eld. de la Pola Esperanto-Asocio. Prezo: zl. 8.

Libreto pri reforma muzikskribo. Krom la enkonduko ĝi inkluzivas 4 partojn, t. e. “Notado de Sonaltecio”, “Notado de Ritmo kaj Mezuro”, “Diversaj Signoj” kaj “Rimarkoj pri Realigo de la Projekto”.

Ne estante muzikisto mi ne povas fari juĝon pri ĝi ĉu ĝi devas

esti tuj aplikata aŭ ne en la muzikaj presadoj. Sed laŭ mia laika opinio tiu ĉi nova sistemo verŝajne estas sufiĉe racia kaj al la naturo de la muziko kaj por la muzikiloj. Krome ĝi en multaj aspektoj estas bazita sur la malnova sistemo, kaj al tiuj, kiuj kutimas al ĉi lasta, ĝi ne prezentus grandan malfacilon.

Al muzikistoj kaj muzikamantoj ĝi estas rekomendinda almenaŭ por esplorado.

R. F.

PROF. SEIĈI KATO: **LERNOLIBRO PRI OFTALMOLOGIO**—Dua eldono reviziita kaj kun nova formato 14.7 × 21 cm., p. 123. Eld. de Shinkjo Presejo, Naganjo, Japanio.

La unuan eldonon ni jam recenzis en la 1-a numero, 1961 de nia gazeto. Nun al la reviziita eldono ni povas diri aldone nur tion, ke laŭ stilo kaj elektado de terminaro ĝi multe pliboniĝis ol la antaŭa eldono. Pri la valoro de la enhavo la rapida elcerpiĝo de la unua eldono ja diris ĉion. Ni gratulas la rapidan kaj pli



Detaloj pri Inventaĵoj

La gazeto “El Popola Ĉinio” estas unu el la interesaj revuoj, kiuj donas ĉiuspecajn materialojn. Ĉinio estas lando kies alta kulturo estas konata de plej antikva tempo. Tie estis la inventaĵoj de la unua kompasilo, porcelano, silkajoj, delikataj, tre artecaj skulptaĵoj el eburo, k. c. Mi dezirus pli detalan priskribon pri tio en la gazeto.

Krom tio mi estus tre ĝoja, se la gazeto aperus 12 fojojn dum la jaro.

A. N. USSR

Varbado por EPĈ

Mi pruntedonas mian personan kolekton de EPĈ kaj la reproduktajn de la ĉin-stilaj pentraĵoj kiujn vi sendis al vi. Mi tiamaniere jam varbis du novajn abonantojn. Mi ĵus varbis trian, kiu eĉ ne scipovas Esp-on sed kiu estas allogita de la beleco de EPĈ kaj certe lernos la lingvon por legi vian revuon.

A. BERTIN, FRANCO

Utiligo de Materialo

Mi utiligis la materialojn de EPĈ per jenaj manieroj: legado de la artikoloj kun gelernantoj,

prezentado de ĉin-stilaj pentraĵoj dum la lecionoj, per interparoloj, konstante en mia hejmo. Jam dufoje dum urba ekspozicio mi uzis diversajn eltranĉaĵojn por lernejoj murgazetoj kaj diversflanka ornamigo.

T. TYBURCJUSZ, POLLANDO

Du Leteroj pri Tradukado de Artikoloj

Mi informas vin pri mia sukceso. En la pasinta jaro mi partoprenis la kongreson de budapeŝtaj ĥirurgoj, kaj tie mi rakontis akcidenton de k-do Vang Cunbaj. Mia prelego tie atingis grandegan interesiĝon. Por la plej granda semajna gazeto kun bildoj “Lando-Mondo” mi jam tradukis hungare la artikolon de Hinhua, kaj mi tie ĉi donis la titolon: “Granda venko de ĉinaj

bonan reeldon kaj salutas la aŭtoron pro lia modesta kaj diligenta laboro en la reviziado.

Rimarkinda estas ankaŭ tio, ke ĝi havas du novajn aldonojn: nome "Vortoj Uzataj en la Medicino" kaj "Terminaro Oftalmologia". En la unua la aŭtoro elmetis pripensindan problemon kaj rakontis sian decidan bataladon tiurilate. Ankaŭ la dua estas utila. Sed ĝi estus pli utila, se ĝi estus aranĝita kun indeksaj ciferoj de la verko.

P. A. G. WRIGHT: LA DU PUPOJ KAJ ALIAJ RAKONTOJ — Unua libreto de la serio de "Esperanto Primary Readers" (Elementaj Esperantaj Legolibroj). Multobligita eldono de SBET (La Societo de Britaj Esperantist-instruistoj). Formato: 11 × 16.5 cm., 23 p. Prezo: £ 1s.6d. plus sendkosto.


Tute ne impona tamen lerte redaktita kaj bonega libreto por geknaboj. Ĝi enhavas 4 rakontojn, nome "La Du Pupoj", "La Saĝa Hundo", "Danĝero", "La Knabo kaj la Flavaj Rozoj". La rakontoj

estas interesaj kaj instruaj al la geknaboj. La teksto estas redaktita en simpla, klara lingvo kaj precipe laŭ la pensmaniero de la geknaboj.

Katalogo de Philips pri X-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj—de la direkto de la sekcio de medicinaj aparatoj de N. V. Philips Gloeilampenfabrieken, Eindhoven, Nederlando.

La ilustrita katalogo donis superrigardon de aparatoj kaj ekipoj fabrikataj de Philips. Ni devas gratuli la eldonon de la unua katalogo en Esperanto kaj respekti la aŭtoron pro lia penado. Ĝi estas bonega iniciato. Ni esperas ke la katalogo fariĝos ekzemplo de aliaj fabrikantoj, por ke ili eldonu sian propran katalogon ankaŭ en Esperanto.

Kvankam la lingvo uzata estas gramatike korekta tamen kelkaj propraj nomoj estas diskutindaj, ekzemple, Piedestala Bucky, Examix, Diagnoscope, ktp. Ĉu oni ne devas ŭzi vortojn esperantigitajn?



Korespondi Deziras

*Multnombro geknaba grupo el Siberio dez. kor. kun samaĝuloj (11-14 jara) ĉl. pri diversaj temoj. Tujan respondon. USSR, Barnaul-17, Do vostrebovanja, V.V. Masliĥov.

*S-ino Vesela Ivanova Popova, "6 septemvri", No. 13A, Sofia, Bulgario, pri lingvaj kaj juristaj demandoj kun ĉl.

*F-ino Galina Bojkova Ĉolakova, "Slavjanska" No. 7B, Sofia, Bulgario, kun junaj ges-anoj.

*Gafur Muĉo, L. 8 Nendori, Rr. "Thanas Ziko" No. 56, Tirane, Albanio, kun ĉl.

*20 ges-anoj dez. kor. kaj interŝ. pk., pm., alumetetiketojn kun Ĉinio kaj aziaj landoj. USSR, Estonio, ABJA-PALUOJA, s/r. Aia 12, Ants Mikk.

*Geknaba Esp. Grupo de Svetlana Gareva (20 infanoj 10-14 jaraj), pri ĉt: Resp. garantiata. S-ro Marŝaŭkovski, poŝtfako 254, Gdansk 1, Pollando.

*La jenaj bulgaraj geesp-istoj dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. kaj interŝ. bk. Respondo garantiata:

Kosta Tringov, str. V. Kolarov 15, Svilengrad, Bulgario.

Krastjo Filipov, str. Pat za Komunizma 3, Svilengrad, Bulgario.

Gavrail Spasov, str. Anton Ivanov 16, Svilengrad, Bulgario.

Evgenja Metlarova, str. V. Levski 27, Svilengrad, Bulgario.

*S-ano Asztalos Lajos, str. Cotita nr. 2, Cluj, Rumanio, precipe pri geografiaj temoj. Sendas pm. k bk, kontraŭ geografiaj revuoj k geografitemaj libroj.

*Neli Delieva, lernantino 14-j., Kolarov 26, k Maria Dakoba, ler-

hirurgoj". Por la artikolo mi petas ke vi forsendu la kvar fotojn. . . .

A. G. POLOŠKEY, HUNGARIO

Kun multe da intereso mi, kiel pentristo, legis la artikolon pri Ki Bajŝi. Mi estas kunlaboranto en nederlandlingva revuo pri la desegno- kaj pentro-arto titolita: "Kun Paletro kaj Desegno". Nun kreskis plano en mia kapo traduki la artikolon pri Ki Bajŝi en mian lingvon kaj sendi ĝin al la nomita revuo. Mi kredas, ke la redakcio rezervos lokon por ĝi, kondiĉe ke bildoj ĉeestu. . . .kompreneble la revuo ŝatas ilustrati la artikolon.

J. MEIJER, NEDERLANDO

RIMARKO DE LA REDAKCIO:

Ni konstatis kun granda ĝojo, ke ĉiam pli kaj pli da legantoj interesiĝas pri la tradukado de

artikoloj de EPC por publikigo en sialandaj gazetoj, tagĵurnaloj, ktp. Krom la du leteroj supre cititaj, similaj postuloj ofte venadas al ni de aliaj entuziasmaj samideanoj. Ankaŭ Esp. revuoj, dank' al la iniciato de iliaj redaktor(in)oj, aperigis fojon post fojo, tute aŭ parte, represojn de niaj artikoloj.

Ĉu per tradukado, ĉu per represo ĉiam pli kaj pli montriĝas la valoro de Esp. kiel utila ilo por nia interkompreniĝo kaj amikeco. Permesu, ke ni profitu tiun ĉi okazon por esprimi nian profundan dankon al ĉiuj niaj kunlaborantoj.

Ni tre esperas, ke niaj karaj legantoj kaj samideanoj ankoraŭ plue daŭrigos sian kunlaboron kun ni. Bonvolu skribi al ni, kiam ajn vi bezonas fotojn aŭ alian helpon. Ni estas ĉiam pretaj fari nian servon.

Distra Angulo

R I D U

— Kolektiva ludo —

La ĉeestantoj sidu ronde. Unu el ili rolu kiel gvidanto de la ludo kaj staru en la mezo.

Komencante la ludon la gvidanto anoncu:

“En mia mano estas la plej ĝoja kaj ĝojiga sono — rido. Mia rolo estas ĝin transdoni. Sed la rido devas esti komencita de mi mem. Se iu alia ankaŭ ridos dum mia ridado, tiu devos gvidi la ludon anstataŭ mi. Alie, mi devos provi ĝin transdoni al iu el vi. Se ankaŭ tiu sukcesos sin deteni de ekrido, mi devos fari provon ĉe iu alia daŭrigante la ridon mem. Sed se iu fine akceptos la ridon, mi estos rajtigita direkti la ridon laŭplaĉe. Tio signifas, ke mi povos iam ajn ĝin repreni de, aŭ doni al iu ajn, aŭ al ĉiuj samtempe per cirkla mangesto, kaj oni devos tuj ridi aŭ ĉesigi la ridon laŭ mia direktado. Kiu ne agos obee, tiu estos punata. Al la ceteraj, kiuj ne ricevis la ridon, ridi estas malpermesite.”

Tion dirinte la gvidanto ĵetas (nur geste) la ridon en sian buŝon kaj la ludo komenciĝas. Se li volas ĉesigi la ridon, li faras geston kvazaŭ li prenis la ridon el la buŝo. Ĉu viaj geamikoj estas neridemuloj? Gvidu, ridu kaj vidu.

vuon TAMEN, skribu al la ĉi suba adreso, indikante objekton de interŝanĝo.

Ni akceptas ĉiaspecajn E-ajojn, albumojn pri pejzaĝoj, pitoreskaĵoj, vidindaĵoj, il. neuzitajn pk, pm. en plenaj serioj, ktp.

Por komparo de prezo, ni informas, ke la eventuala interŝanĝo estu valora je 15 respondkuponoj (por la tuta jaro).

Junulara Esperanto-Rondo
GUTO EN MARO

Poŝta Liceo, str. Grodzka 34,
Nowy Sacz 2 — Pollando

“NE HAKU LA FELON!”

Iu komercisto iris kune kun sia filo profunde en montaron por akiri profitodonajn komercaĵojn. Subite li estis kaptita de granda tigro. La filo volis lin savi el ĝia buŝo, kaj persekutis tuj la tigron kun glavo en la mano.

Tion vidinte la komercisto laŭte kriis al la filo: “Filĉjo, haku nur la piedojn, sed ne la felon! Alie, malmulte ĝi valoros.”

“TENU LA SEKRETON!”

Iu malriĉa intelektulo ofte fanfaronas sian riĉecon antaŭ siaj konatoj. Kaj tio allogis iun ŝteliston. Iunokte la ŝtelisto sin ŝovis en lian domon, sed tie li trovis neĉion ŝtelindan. Kun insultoj li malkontente forlasis la domon. Tion vidinte la intelektulo tuj lin kuratingis kaj donacis al li sian lastan moneron dirante: “Pardonon, ke vi vane min honoris! Tamen mi petas, ke vi tenu la sekreton!”

nantino 16-j., Str. Sjarov 19, ambaŭ en Loveĉ, Bulgario dez. kor. k interŝ. bk. k fotojn.

*S-ro Mura Jean, 45 rue St. Michel, EPINAL (Vosges), Francio, kun ĉiuj aziaj landoj pri pm., pk.

*Benciono Berin (isntruisto), interŝ. ABC-librojn porinfanajn ĉiulingvajn. Arangota granda ekspozicio de ABC-lernolibroj, USSR, Vilnius-5, Ukmerges 17-17.

Atentu Rondo k Apartaj Gesamideanoj

Se vi dez. ricevadi interŝanĝe polan junularan, pomonatan re-

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (87) 1964

Ĉefa Enhavo

Bildo sur la kovrilo — Hiaŭgia kaj Hiaŭman.

Foto de Sun Kjaŭsen

Nia Vojo por Industriigo

La Naskiĝo de Unu Granda Fabriko

Mia Ĝojo

“Fremdlanda Oleo” — Nomo Arkaikiĝinta

**Kuraca Centro en Paŝta Regiono
Urĝsava Taĉmento el Vojaĝantoj**

La Belaj Traĵtoj de Baŭrgaj-agrofarmo

“Vojo, Nia Pen’” kaj Ĝia Komponinto

Filatelio en Ŝanhajo

Kion Diras la Serpent-kaptisto

Fotado (Novelo)

La Tintileto

Impresoj de Tanganjika Ministro

Ke Malio Havu Sian Sukeron

Post la Kurso

*Bildo sur la dorskovrilo —
Rododendro.*

Foto de Vu Jinbo

? KION Vi volas legi en la estontaj numeroj de nia gazeto, karaj legantoj? Sciigu al ni la temojn!

La Red.



Abunda Koton-rikolto en Hingiang

Foto de Jue Guofang

